

Bulgara ESPERANTISTO



10-11
1974

ENHAVO

* * *	Vivnecesa kiel aero kaj suno	2
	Penka Palazova. Kanto pri mia patrujo	2
	Stefan Sokolov. La ruĝa stelo	2
	Atanas Bojaĝiev. Dimităr Hristov Kamburov	4
* * *	Bulgaraj esperantistoj pereintaj en la kontraŭaŝisma batalo	6
* * *	Streĉa laboro dum la jubilea jaro	13
	K. Konstantinov. E-aktiveco en Pazargik	13
	G. Dolapĉiev. Naŭseptembra solenaĵo en Sofio	13
	B. Kavalĝiev. Solena kunveno en Ruse	14
	M. Conkovski. IV Fojra Internacia Esperantista renkontiĝo en Plovdiv	14
	K. Kondov. Viva estas la memoro pri la heroo Marko Ivanov	14
	M. Diĉeva. En Smoljan-distrikto oni vigle rekonstruas la ideedukan E-laboron	15
	V. Mitovski. Renkontiĝo de esperantistoj el Trojan kaj Pazargik	16
* *	E-kursoj komenciĝis multloke: Smoljan, Boljaro, Sofio	16
	T. Kurtev. Bonaj internaciaj ligoj	16
	I. Nikolov. Rezultoj de interfratiĝo de urboj	17
* * *	XXX Kongreso de TEJO	18
	A. Todorov. Internacia arkeologia E-brigado ĉe Nigra Maro	18
	Mihala Roĉmanova. Junulara ekskurso al Gabrovo	19
	Marin Baĉev. Dek tagojn en la unua internacia tendara lernejo en Primoŝteno	19
	Georgij Korotkeviĉ. Scienca lingvistika konferenco en Moskvo	21
	Nenko Jonkov. III Esperanto-Festivalo en Opava	22
* * *	Inaŭguro de tombomonumento de Julio Baghy	22
	Hristo Gorov. Rimarkinda jubileo de GDR	25
	Romano Grinŝpan. Pri la formo de la slogano „Amikeco trans limoj“	25
	Violin Oljanov. Iuj metodikaj demandoj de la Esperanto-instruado	25
	Canko Murgin. „Doktoro kaj lingvo Esperanto“ de Adolf Holzhaus	28
* * *	„Nuda inter lupoj“	29
	Ljuba Bojaĝieva. Nia septembro	30
	Ljudmila Jevsejeva. Matene. Rano	30
	Arturs Kubulnieks. Jubilea ekspozicio	30
	Zurhan Ĝemazaŝvili. Kiam tio okazis	31
* * *	La venenita ŝtelisto	32
	Marin Baĉev. Ĉevaliro	32
* * *	Deziras korespondi	III
* * *	Literatura internacia konkurso (teatro)	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Grupo da partoprenantoj en la Internacia Arkeologia Esperantista Laborbrigado ĉe Nigra Maro

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

**VIVNECESA KIEL AERO KAJ SUNO**

Ankaŭ en ĉi-jara aŭtuno efektiviĝas Monato de la Bulgara-soveta Amikeco, dum kiu eminentaj sovetaĵ scienculoj, artistoj kaj sociagantoj gastas en nia lando kaj kontaktas kun homoj el diversaj tavoloj de nia popolo. Samtempe oni solenas la 30-an datrevenon de la unuaj societoj por amikeco kun la soveta popolo, kiuj fondiĝis en nia lando jam en la epoko de la kapitalismo.

La amikeco inter la bulgara kaj rusa popoloj komenciĝis antaŭ pli ol milo da jaroj dank' al ilia slava origino. Aparte kontribuis por tio la komuna alfabeto, kies aŭtoroj estis Kiril kaj Metodi.

Dum la osmana jugo Ruslando akceptis bulgaraĵn junulojn kaj ebligis al ili studadon en Peterburgo, Moskvo, Odeso kaj aliaj urboj. En Ruslando ili konatiĝis kun la revolucidemokratiaj ideoj de Belinski, Hercen, Dobroljubov, Ĉerniŝevski k. a. La plej brila ekzemplo estas Ĥristo Botev — nia nacia poeto-revoluciulo.

La rusa popolo oferis la vivon de 200 000 soldatoj por la liberigo de Bulgario el sub la nigra 500-jara osmana jugo. Sur montopinto Stoletoŭ (proksime de Ŝipka), en Sofio, Pleven, Sviŝtoŭ kaj en centoj da aliaj urboj kaj vilaĝoj, sur montetoj kaj en valoj staras majestaj aŭ modestaj monumentoj, memorigantaj al la junaj generacioj pri la sinoferemo de la rusa popolo.

Dum du jardekoj, kiam en Bulgario furiozis la faŝista teroro, miloj da bulgaraj kontraŭfaŝistoj serĉis azilon en Sovetunio. Tie ili trovis laboron aŭ studis en diversaj altlernejoj.

Kiam en la aŭtuno de 1944 la venka Ruĝa Armeo transiris Danubon, nia popolo renkontis la sovetaĵn soldatojn laŭ malnova slava kutimo kun pano kaj salo.

Venis la paco. Nia popolo decidis sekvi la ekzemplon de la sovetaĵ fratoj — konstrui socialisman socion. Lando de manifaktura produktmaniero, sen modernaj entreprenoj, sen grandaj elektrejoj, nia lando vegetadis. Tiam venis la soveta malavara ekonomia helpo. Nun, 30 jarojn post la disrompo de la kapitalismaj katenoj, nia lando estas konata kiel evoluinta industriagrara ŝtato. En la tuta lando laboras dekoj da hidro- kaj termocentraloj, unu-klasaj kemientreprenoj en Burgas, Dimitroŭgrad, Devnĵa, Jambol, Vraca ktp. La metalurgiaj entreprenoj en Kârĝali, Plovdiv, Pernik, Gabrovo, Kremikovec kaj aliloke partoprenas aktive en la internacia merkato.

Estas fundamente rekonstruita la bulgara vilaĝmastrumo. Malaperis por ĉiam la limoj inter la grenkampoj. La soveta scienca, faka kaj belarta lite-

raturu estas je dispono de ĉiu bulgaro. Ĝi estas neelĉerpebla fonto de ĉiuj specaj spertoj kaj saĝo.

La sovetaj homoj ŝatas la bulgaran arton kaj kulturon. Ĉi-somere pli ol 500 bulgaraj artistoj kaj kulturagantoj gastis en sovetaj urboj.

Georgi Dimitrov diris, ke la amikeco de nia popolo al la sovetaj popolo estas tiel necesa, kiel la aero kaj la suno por ĉiu viva estaĵo. Tiu penso estas profunde komprenata de ĉiu bulgara patrioto kaj internaciisto. Tion trafe esprimis la gvidanto de nia partio kaj ŝtato Todor Živkov substrekante, ke ni transformis la bulgaran-sovetan amikecon de revo kaj celo en konkretan realon, en potencon materialan forton de nia evoluo.

La bulgaraj esperantistoj kiel parto de sia popolo ĉiam admiris la atingojn de Sovetunio kaj multon lernis de la sovetaj esperantistoj depost la Granda Oktobra Revolucio.

Vivu kaj floru plu la bulgara-soveta amikeco por la bono de Bulgario kaj Sovetunio, por la progreso de la tutmonda paco kaj amikeco!

POEZIO kaj BELETRO

KANTO PRI MIA PATRUJO*

de Penka Palazova

Triumfu hodiaŭ,
festa patrujo,
lumigu per ĝojo
milojn da koroj. . .
Floranta en via juneco,
vi je printempo odoras,
vi donas impeton
al niaj pensoj,
al niaj laboroj!
Blankaj, sunplenaj domoj,
senfinaj kampoj,
uzinoj — gigantoj,
okuloj — baraĵlagoj,
homoj kun flamaĵoj —
jen estas nun

mia patrujo!
Triumfu, patrujo
festanta,
libera,
kunvenis la homoj,
laboroj
kaj revoj!
Konduku nin
ĉiam antaŭen,
ĉiam
al novaj sukcesoj,
mia amata patrujo,
hela bonsorto
nia.

* La versaĵo ricevis II-an premion en la Jubilea Literatura Konkurso de „Bulgara Esperantisto“ 1974.

LA RUĜA STELO

de Stefan Sokolov

La vojo supreniris sur la nuda monteto norde de malgranda montara urbo. La veturilo, tirata de ĉevaloj, moviĝis nerapide kaj peneme. Sed poste, transpasinte la altajon, ĝi libere kaj gaje ekruliĝis sur la blanka ŝoseo, kiu serpentumis al la valo. Mi avide rigardis ĉirkaŭ: montoj, ĉie montoj. Ili ne kon-

sternis per sia kruda majesteco kiel la grandeguloj de Rila, sed inspiris sekurecon kaj trankvilon per siaj molaj, nealtaj, ovalaj konturoj. Ĉi tie ĉiu arbusto aŭ murmuranta torenteto allogas la vojaĝanton kaj kvazaŭ flustras: „Venu al mi! Haltu momenton! Ĉi tie nenio minacas vin! Estu ĉi tie kvazaŭ

hejme!“

Kaj vere, novan domon mi trovis en tiu ĉi idilia kaj de la mondo forgesita angulo post la teruraj travivaĵoj en nia ĉefurbo, duonruinigita de la usonaj bombadoj. Ĉi tie kelkan tempon mi dormis senzorge, manĝis frandeme la fresbakitan panon, kiun mia partino lerte knedis, promenis en la ĉirkaŭaj arbaroj, banis min en la klaraj akvoj de la montaraj riveretoj, helpis al nia dommastrino ĉe la kampa laboro.

Sed ho ve. . . Ankaŭ ĉi tie oni eksentis, ke la mondo brulas en la flamoj de longedaŭra kaj kruela milito. Kelkfoje la sonorilego de la malgranda preĝejo sonoris alarme kaj sciigis, ke la ĉielon de la patrujo trapasas teruraj „flugantaj fortikaĵoj“, kiuj senkompate elverŝis sian pereigan ŝarĝon sur la sendefendan loĝantaron de nia lando.

Kelkfoje iuj kortoj de la urbeto pleniĝis de malesperaj kriegoj kaj lamentoj de malfeliĉaj virinoj. Oni sciigis al ili, ke iliaj edzoj pereis malproksime kiel soldatoj en la bulgara okupacia korpuso en Serbio. Ankaŭ en nia regiono la popola rezistado kontraŭ la Hitler-armeo kaj ĝiaj bulgaraj servantoj estis forta.

Iun tagon oni ekzilis grupon da progresemaj junuloj al koncentrejo sur mara insuleto apud Burgas. En la montaro daŭris la aktivado de la partizanoj. En la vintro sur la placo de la urbo policanoj ekspoziciis fortanĉitajn kaj sur palisojn pikitajn kapojn de kaptitaj eksterleĝuloj. Sed anstataŭ timigi la popolon per tio ili pliintensigis la reziston.

Tamen plej forte efikis la ĉiutagaj novaĵoj, ke la Ruĝa Armeo kiel neretenebla lavango tagon post tago persekutas kaj frakasas la faŝistajn germanajn trupojn. Post la kapitulaco de Rumanio la eventoj komencis disvolviĝi kun fulma rapideco. . .

La loĝantoj de la malgranda montara urbo kaj mi, tiam junulo, sekvis

la antaŭenmarŝon de la Ruĝa Armeo kun kortremo. Jam estis proksime niaj fratoj-liberigantoj. . .

*

La septembra tago estis klara kaj suna. Sur la ŝoseo ĉe la norda parto de l'urbeto oni starigis improvizitan arkon kaj ornamis ĝin per floroj kaj verdaĵoj. Ĉirkaŭe amasiĝis ĉiuj loĝantoj. Ĉi tie staris en rekta vico la revoluciaj junuloj. Armitaj per fusiloj, ili prezentis la gvardion de la nova popola aŭtoritato, ekzistanta nur depost kelkaj tagoj. Ĉi tie estis la nova urbestro, liberigita politika arestito. Vice kun li staris maljuna, de ĉiuj estimata instruisto. Konvinkita patrioto, li ne kaŝis sian malkonsenton kun la „ruĝaj“. Sed studinte la programon de la Patrolanda Fronto li deklaris, ke ĉiu honesta bulgaro devas meti sian subskribon sub ĉiun vorton de tia patriota programo. Ne mankis ankaŭ la juna pastro. Li estis ornaminta sian sutanon per ruĝa rubando. Ĉi tie krom la bulgaroj ĉeestis ankaŭ la lokaj turkoj, kiuj prezentis grandan parton de la loĝantaro. Kaj la ciganoj, la senzorgaj brunhaŭtuloj, loĝantaj en la malsupra parto de la urbo en malgrandaj mizeraj dometoj, ne ĉesis gaje babilii irante tien kaj reen.

Pasis longaj horoj, sed neniu revenis hejmen. Ĉiuj atendis. . . Atendis tiujn, sen kies venko ne estus ebla la venko de la popola ribelo je la 9-a de septembro, sen kies helpo en nia lando ne leviĝus por dua fojo la aŭroro de la libereco. . .

Kaj jen, fine norde sur la ŝoseo, en nuboj da polvo, ekbrulis la motocikloj de la tiom sopire atendataj sovetaj fratoj. Ili devis halti antaŭ la viva maro de la atendantoj. Ŝtorma „hura!“ tendis la aeron. Entuziasmaj krioj „Bonvenon, fratoj niaj!“ Ĉirkaŭprenoj. Surŝutado per floroj. Larmoj pro ĝojo en la okuloj. . .

(Sekvas sur p. 8)



DimitĀr Kamburov naskiĝis je la 27. XII. 1900 en vilaĝo Palatica (nun Kamburovo), distrikto de Tġrgovište. Studante en la gimnazio de Ŝumen, li estis en la medio de progresemaĵ ler-



nantoj, kun kiuj li studis verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Blagoev.

Fininte la gimnazion en 1920, Kamburov iĝis instruisto en sia naskiĝvilaĝo. De tiam li dediĉis sian tutan vivon en servo al la popolo.

Dum la sama jaro — 1920 — Kamburov fariĝis membro de la loka orga-

nizaĵo de la Bulgara Komunista Partio, fondita de la instruisto DimitĀr Vamporov, pli aĝa ol li.

En 1927 la juna Kamburov partoprenis la konstruon de popola legejo en la vilaĝo kaj la sekvan jaron fondis konsumkoopativon.

En la periodo 1931—1935 Kamburov kune kun aliaj aktivaj gekolegoj organizis la tiel nomatan instruistan „profopozicion“ (sindikatan opozicion), kiu vikle laboris inter la instruistaro. En regiona instruista konferenco en 1935 la membroj de la profopozicio batalis sub la slogano „For la trudita faŝista instruista asocio!“ Sekve de tio oni eksigis 7 geinstruistojn, inter kiuj Kamburov. En tiu tempo li lernis Esperanton kaj organizis esperantistan grupon por kolektiva korespondado. Tiam aparte vikle marŝis antaŭe la laborista E-movado en nia lando, organizita en sia Laborista E-Asocio (LEA). La ĵurnaloj „Mejdunaroden Ezik“, „Mejdunaroden Rabselkor“, la lernolibro de Asen Grigorov laŭ la metodo de la soveta inĝ. Rubljov, la eldonaĵoj de „Ekrelo“ en Germanio, la vigla E-movado en Sovetunio — ĉio ĉi favoris al niaj rilatoj kun diverslandaj instruistoj. Pli ol 10 instruistoj estis en la grupo: Zdravka Merĝanova, Dobrina Kuleva, Ilija Ajladanski, Atanas Dimitrov, Mitĵu Manov k. a. La grupo korespondis precipe kun instruistoj el Sovetunio kaj Francio.

Kamburov pledis, ke la instruistoj ler-

nu la spertojn de la sovetaj instruistoj, la plej progresemaj en la mondo, ĉar ili ĝuas vere kreajn kondiĉojn por instrui kaj eduki la infanojn en spirito de nova, socialisma humanismo.

Kamburov kiel respondeculo de la E-grupo treege ŝatis tiun ĉi agadon. Ni korespondadis kun instruistoj-esperantistoj el la pedagogia instituto de Kremenĉug, el la pedagogia lernejo de Gorlovka kaj aliaj sovetaj urboj. La leteroj de tiuj du grupoj de sovetaj instruistoj nin entuziasmigis kaj ofte ni tradukis kaj sendis ilin al j. „Uĉitelska Borba“ (Instruista Batalo) k. a. Kelkaj el ili aperis ankaŭ en nia loka „Instruista Kajero“, en kiu ni publikigis artikolojn pri nia mizera vivo (la salajrojn ni ricevadis kun 5—6-monata malfruigo), kontraŭ ŝovinismo, religiaj antaŭjuĝoj kaj aliaj reakciaj fenomenoj en la lernejoj. Tiu ĉi „Kajero“ estis eldonata sekrete: En ĝi ni metis ilustraĵojn el la soveta „Ogonjok“ kaj el la fama franca „Regard“.

D. Kamburov estis tre kontenta, ke ni sperte uzas la Internacian Lingvon en la batalo por nova vivo.

Venis la jaroj de la Dua Mondmilito. Dimităr Kamburov aktive partoprenis la kampanjon por kolektado de subskriboj sub la popola postulo por kontrakto pri neagreso inter USSR kaj Bulgario, la tiel nomatan „Sobolev-akcion“. Post la aroga invado de la hitleranaj hordoj en USSR kaj ĉe la efemeraj sukcesoj de Hitler Kamburov havis firman kaj neŝancebleblan kredo je la Ruĝa Armeo, je la saĝa Komunista Partio de Sovetunio. En 1942 li iĝis sekretario de la Regiona

Komitato de Bulgara Komunista Partio en Omurtag. Responde al la alvoko de la Partio en nia regiono dank' al lia laboremo dum unu jaro estis organizitaj batalgrupoj kaj multaj komitatoj de la Patrolanda Fronto.

Je la 28. VII. 1943 Kamburov komencis la vivon de eksterleĝulo — kiel politika komisaro de partizana taĉmento en la regiono de u. Omurtag. Baldaŭ la taĉmento kreskis al 75 homoj kaj dividiĝis en du grupojn — „Tuzluška“ kaj „Balkanska“.

Sekvis batalo post batalo en vilaĝoj Halvaĝiŝko, Pĉelno, Zmejno, Ljubicevo, Moravka k. a.

La furioziĝintaj faŝistaj arme- kaj ĝendarmgvidantoj organizis pli ol 10 000 persekutantojn por frakasi la kreskantan partizanmovadon en la regiono.

En sangoverŝa batalo de la Balkana Grupo kontraŭ multoble pli granda kaj bone armita malamiko je la 26. I. 1944 pereis 13 heroaj-partizanoj ĉekape kun sia brava kaj amata komandanto Dimităr Kamburov.

Vundita je la kruro de la ĝendarmoj, li, fidela al sia ĵuro — ne permesi esti kaptita de la malamiko, — per la lasta kuglo de sia „Efel“ mem pafis sian altan noblan frunton. Kune kun li en tiu ĉi batalo pereis ankaŭ lia filino partizanino Anka Kamburova.

En la nomo de nia kamarado, heroe pereinta en la batalo por popola libero kaj socia justeco, ni, liaj samideanoj-esperantistoj, ĵuras ankoraŭ pli vigle labori por plena triumfo de la socialismo en nia kara Dimitrovpatrolando kaj por la progreso de la Esperanto-movado.

Atanas Bojaĝiev

Nia asocia organo devas eniri la manojn de ĉiu bulgara esperantisto. Ĝi estas lia necesa informilo kaj propagandilo, lia bona helpanto en la laboro por perfektigado de la lingvokonaj.

Abonu ĝin! Abonigu viajn konatojn, viajn eksterlandajn amikojn! Agu energie, senprokraste, kun vere esperantista entuziasmo!

Sumojn sendu rekte al la kancelario de Bulgara E-Asocio, bul. Ĥr. Botev 97, Sofio.



BULGARAJ ESPERANTISTOJ PEREINTAJ EN LA KONTRAŬFAŝISMA BATALO

La bulgara esperantistaro partoprenis aktive la batalon kontraŭ la faŝismo en nia lando dum la periodo 1923—1944. Multaj el ili suferis arestojn, malliberecon, koncentrejojn. Multaj falis heroe en la batalo.

Okaze de la 30-jara jubileo de la popola venko en Bulgario ni publikigas nomaron de la konataj al ni esperantistoj, pereintaj en la batalo por libero kaj socia justeco. Pri multaj esperantistoj-herooj nia asocia organo, kiel ankaŭ neesperantistaj bulgaraj periodaĵoj, skribis pli detale. Tion ni faros ankaŭ estonte.

Ni bone scias, ke la ĉi-suba nomaro ne estas plena. Tial ni petas ĉiujn legantojn sciigi al ni la nomojn de esperantistoj pereintaj en la batalo, kiuj ne troviĝas en tiu ĉi listo. „Bulgara Esperantisto“ publikigos aldonan nomaron. Ankaŭ pri eventualaj eraroj oni atentigu.

La nomojn ni vicigis laŭ distriktoj kaj kronologie laŭ datoj de pereigo. Nomojn de pereintoj, kiuj agis pli longe ne en sia naskiĝdistrikto, sed en alia, ni metas en tiun lastan.

Mallongigoj:

BKP=Bulgara Komunista Partio

RMS(Rems)=Laborista Junulara Unuiĝo (Junkomunista Unuiĝo).

BONSS=Bulgara Ĝenerala Popola Studenta Unuiĝo

DK=Distrikta Komitato

RK=Regiona Komitato

Blagoevgrad

1. *Stojo Ljondev* — nask. 20. IV. 1912 en v. Dutlja, loĝis en u. Nevrokop (nun Goce Delĉev). Instruisto. Aktivulo de RMS. Grave malsaniĝinta en malliberejo, mortis je la 19. VI. 1936.

Burgas

2. *Jovĉo Petkov Ĵelev* — nask. en u. Kableŝkovo 10. IV. 1920. Membro de DK de BKP. Kiel soldato mortkon-

damnita kaj pafita en kazerno (2. VI. 1942).

3. *Ganĉo Hardulov* — nask. 7. II. 1915 en u. Karnobat. Membro de RK de BKP. Politika komisaro de partizantaĉmento. Pereis en interpafado kun la polico en v. Kruŝevo — (13. XII. 1943).

Gabrovo

4. *Minĉo K. Minĉev* — nask. 25. XI. 1920 en v. Stolât. Kudrolaboristo. Kiel soldato mortkondamnita kaj pendumita (24. VI. 1942).

5. *Ivan Bankov Dobrev* — nask. 27. IX. 1919 en v. Berievo. Poŝtoficisto. Pro kontribuo al BKP mortkondamnita. Pendumita en la Sofia Malliberejo (2. XI. 1943).

6. *Atanas St. Vlaev* — nask. 11. I. 1921 en v. Gorna Rosica. Partizano. Kelkfore pafbatalis kontraŭ policanoj kaj soldatoj en v. Krâvenik kaj mortis heroe (7. XI. 1943).

7. *Ivan Vladkov* — nask. 15. I. 1915 en u. Drjanovo. Oficisto. Kunlaboranto de CK de BKP. Mortkondamnita kaj pafita sur la Sofia Militista Pafejo (22. XI. 1943).

8. *Kunĉo Gatev Kunĉev* — nask. 21. VI. 1917 en v. Lovni Dol. Kudrolaboristo. Helpanto de partizanoj. Mortpafita sen kia ajn juĝproceso (29. II. 1944).

9. *Nenko Marinov Velĉev* — nask. 10. II. 1917 en v. Lovni Dol. Terkulturisto. Sekretario de la loka organizado de BKP. Helpanto de partizanoj. Mortpafita sen kia ajn juĝproceso (29. II. 1944).

10. *Nenko Iliev Nenkov* — nask. 15. X. 1920 en v. Kruŝevo. Studento. Sekretario de RK de RMS. Partizano. Pereis en herooa batalo apud v. Balvan (28. III. 1944).

11. *Stojan Iv. Baĉvarov* — nask. 9. III. 1920 en u. Sevlievo. Komandanto de la partizantaĉmento de Gab-



rovo-Sevlievo. Pereis en heroa batalo apud v. Balvan (29. III. 1944).

12. *D-ro Vârban Genčev* — nask. 26. VII. 1918 en v. Careva Livada. Kuracisto. Membro de DK de BKP. Politikomisarano de partizantaĉmento. Membro de DK de BKP. Pereis en batalo kontraŭ la polico en v. Gorski Izvor, distrikto de Veliko Târnovo (30. III. 1944).

13. *Lalju Dragiev Lalev* — nask. 6. III. 1917 en v. Dragievi. Kooperativa oficisto. Membro de DK de Patrolanda Fronto. Helpanto de partizanoj. Vundita ĉe la sturmo de la poŝtejo en u. Gabrovo fare de la popolaj armitaj trupoj je la 8. IX. 1944. Mortis je la 9. IX. 1944 — la tagon de la tutpopola venko.

Ĥaskovo

14. *Kosta Angelov Ivanov* — nask. 10. III. 1914 en v. Jabalkovo. Sekretario de RK de RMS. Falis en batalo kontraŭ la polico apud u. Ĥarmanli (28. I. 1935).

15. *Margarit Gogov* — nask. 13. X. 1914 en u. Ĥarmanli. Aktivulo de RMS. Pereis en batalo kontraŭ la polico apud Ĥarmanli (28. I. 1935).

16. *Todorka Paunova* — nask. 3. VI. 1924 en v. Vâglarevo. Lernantino. Gvidantino de RMS-organizo en la gimnazio de Ĥaskovo. Pereis en pafbatalo kontraŭ policanoj kaj soldatoj apud Ĥaskovo (7. IV. 1943).

17. *Dimitâr Kanev* — nask. 14. XI. 1921 en v. Ĥaskovo. Membro de DK de RMS. Kiel soldato mortpafita en kazerno (7. XI. 1943).

18. *Tenčo Hubenov* — nask. 23. I. 1922 en v. Gorski Izvor. Membro de DK de RMS. Kiel soldato mortpafita en kazerno (7. X. 1943).

Kjustendil

19. *Vladimir Zlatanov* — nask. 19. I. 1917 en Kjustendil. Laboristo. Partoprenis la Internacian Brigadon en Hispanio. Pereis defendante la liberon de la hispana popolo en 1937.

20. *Dimitâr Kaljaški* — nask. 10. VIII. 1910 en v. Ĵilinci. Instruikianto de CK de BKP. Partizano. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico (28. II. 1943).

Loveĉ

21. *Kiril Pavlov* — nask. 9. III. 1890 en v. Aleksandrovo. Membro de Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo (partio). Deputito en la Parlamento. Ministro de la komerco en la kabineto de Al. Stambolijski. Mortigita en la Direkcio de la Polico en Sofio (16. IV. 1925).

22. *Dilo Jotov* — nask. en 1905 en v. Toros. Metalisto. Sekretario de la loka organizo de Komsomolo. Grave vundita de la polico dum unuamaja manifestacio, mortis je la 3. V. 1932.

23. *Stefan Marinov Paŝev* — nask. 9. I. 1905 en v. Stefanovo. Pro politika persekuto elmigris en USSR. Mortkondamnita kaj pafita sur la Sofia Militista Pafejo (26. VI. 1942).

24. *Ĥristo Kârpaĉev* — nask. 24. VII. 1911 en v. Nadejda. Instruisto. Poeto. Sekretario de DK de BKP. Komandanto de partizana taĉmento. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico (23. V. 1943).

25. *Canko Ivanov* — nask. 10. X. 1922 en v. Presjaka. Partizano. Pereis je la 19. VI. 1943.

26. *Bočo Ĥr. Boĉevski* — nask. 8. X. 1914 en v. Ugârĉin. Laboristo. Komandanto de partizana taĉmento. Pereis je la 30. IX. 1943.

27. *Nato Canev Vâlĉev* — nask. 12. V. 1912 en v. Radjuvene. Instruisto. Helpanto de partizanoj. Mortigita je la 16. XI. 1943.

28. *Marin K. Kunĉovski* — nask. 24. IX. 1914 en v. Radjuvene. Ŝuisto. Helpanto de partizanoj. Mortigita je la 16. XI. 1943.

29. *Ilija Marinov Ivanov* — nask. 22. II. 1921 en v. Lomec. Laboristo. Partizano. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico apud v. Borima (30. XI. 1943).

30. *Petko St. Patarinski* — nask. 3. X. 1918 en v. Ugârĉin. Studento. Helpkomandanto de partizana trupo.

Falis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj apud sia naskiĝvilaĝo (7. I. 1944).

31. *Vălčo Šatrov* — nask. 14. X. 1924 en v. Radjuvene. Lernanto. Partizano. Pereis apud u. Loveĉ (8. I. 1944).

32. *Dočo Săev* — nask. 2. VIII. 1919 en v. Staro Selo. Aktivulo de RMS. Komandanto de partizantaĉmento. Pereis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj apud v. Dălbok Dol (12. III. 1944).

33. *Totka Săeva* — nask. 20. I. 1924 en v. Staro Selo. Edzino de Dočo Săev. Partizanino. Pereis la saman tagon kun li.

34. *Kino Kukuviški* — nask. 24. X. 1914 en v. Gabârsko. Laboristo. Membro de RK de RMS. Partizano. Falis apud v. Dragana (16. III. 1944).

35. *Stojan Edrev* — nask. 12. IX. 1915 en v. Radjuvene. Estro de la stabo de XI-a Partizana Zono. Pereis post daŭra pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj en v. Begleĵ, distrikto de Pleven (19. VI. 1944).

36. *Joto N. Vračev* — nask. 15. III. 1915 en v. Glojene. Sekretario de RK de RMS. Komandanto de partizana taĉmento. Falis en la granda pafbatalo apud v. Brusen, distrikto de Sofia (26. VI. 1944).

35. *Ĥristo M. Conkovski* — nask. 24. II. 1924 en vilaĝeto Popeŝka. Konstrutechnikisto. Helpanto de partizanoj. Mortigita en la policejo de Trojan je 15. VI. 1944.

Pazarĝik

38. *Teofil A. Daŝinov* — nask. 20. VIII. 1902 en u. Peŝtera. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝistan Ribelon en 1923. Elmigris en USSR. Partoprenis la Internacian Brigadon en Hispanio kaj pereis por la libero de la hispana popolo apud Madrido (17. V. 1937).

39. *Georgi At. Djundjukov* — nask. 9. I. 1907 en v. Bega. Terkulturisto. Sekretario de la loka organizo de Kom-somolo. Mortigita en la policejo de Plovdiv (24. X. 1942).

40. *Angel Ĉopev* — nask. 0. I. 1910 en v. Ĉepino. Laboristo. Membro de RK de BKP, gvidanto de batalgrupo. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico apud sia naskiĝvilaĝo (3. V. 1943).

41. *Nikola Beĉev* — nask. 25. X. 1915 en v. Karabunar. Terkulturisto. Sekretario de la loka organizo de RMS, komandanto de partizana taĉmento. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico apud v. Boŝulja (16. X. 1943).

42. *Stoil At. Djundjukov* — nask. 17. IX. 1901 en v. Bega. Laboristo. Partoprenis la Septembran Kontraŭ-

„Sekvas el p. 3.)

Nur la junuloj restis sur siaj lokoj. Ili esprimis sian saluton per maŝargo de la fusiloj. Grupo da infanoj, direktataj de sia instruistino, plenforte ek-kantis per siaj sonoraj voĉetoj:

Ho vi, stelo! . . . Ruĝa stelo!
Tuta mond' admiras vin. . .

Jes, ruĝaj steloj staris sur la ĉapoj de la junaj blonduloj, polvokovritaj kaj lacaj. Tiuj ĉi ruĝaj steletoj brilis venke en la ruinoj de Stalingrado, trapasis tra fajro kaj sango la senlimajn ebenajojn de la dezertigita Ukrainio, atingis la kvietan, blankan Danubon,

eniris la fekundan Dobruĝon kaj nun alvenis ĉi tien, al tiu ĉi malgranda balkana urbeto, al nia patrolando. . .

„Ho vi, stelo! . . . Ruĝa stelo!“ — senĉese kaj senlace kantis plu la infanoj.

Kaj la mirinda Ruĝa Stelo ekradiis en la koroj de la malriĉaj kaj laborpremitaj homoj pli forte ol la suno, staranta sur la blua firmamento. Ĝi donis al ili flugilojn, inspiris novan kredon, novan helan esperon. . .

Venis fine la tempo, kiam la homoj en nia Patrujo vere kaj por ĉiam ekvivis en paco kaj libero, en amikeco kaj justeco.



faŝistan Ribelon en 1923. Helpanto de partizanoj. Mortigita apud v. Batak (8. II. 1944).

43. *Stojan Todorov Manev* — nask. 20. X. 1921 en Pazarĝik. Kudristo. Membro de DK de RMS, komandanto de partizana taĉmento. Falis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj apud v. Fotinovo (4. III. 1944).

44. *Angel Čaušev* — nask. 28. VIII. 1903 en v. Batak. Sekretario de loka organizo de BKP. Partizano. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico proksime de u. Bracigovo (10. III. 1944).

45. *Nikola Mišev* — nask. 1. V. 1901. en u. Bracigovo. Tabaklaboristo. Sekretario de RK de BKP. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝistan Ribelon en 1923. Vicpolitikomisaro de partizana taĉmento. Mortpafita apud u. Batak (14. III. 1944).

46. *Todor Kolarov* — nask. 25. VII. 1897 en u. Batak. Sekretario de la loka organizo de Komsomolo. Dum certa tempo politelmigrinto en USSR. Politikomisaro de partizana taĉmento. Pereis je la 7. IV. 1944.

47. *Stefan Škodrov* — nask. 25. VIII. 1914 en v. Radilovo, loĝis en Pazarĝik. Ŝtonĉizisto. Sekretario de RK de RMS. Helpanto de partizanoj. Mortigita proksime de v. Pärvenec, distrikto de Plovdiv (7. IV. 1944).

48. *Vela Peeva* — nask. 16. III. 1922 en v. Kamenica, nun kvartalo de urbo Velingrad, portanta ŝian nomon. Studentino. Partizano. Pro sia heroeco proklamita Popola Heroino. Pereis en pafbatalo apud sia naskiĝvilago (3. V. 1944).

49. *Stojo Kalpazanov* — nask. 4. VI. 1924 en v. Lăĝene. Lernanto. Gvidanto de lernejana batalgrupo, poste partizano. Mortpafita proksime de sia naskiĝloko (17. V. 1944).

50. *Ivan Lukanov Srebrin* — nask. 25. XII. 1913 en v. Kalugerovo. Aktivulo de BONSS. Kuracisto de partizana taĉmento. Mortigita en la policejo de Pazarĝik (16. VI. 1944).

51. *Stojan G. Čoĉkov* — nask. 19.

VII. 1925 en v. Lisičevo. Lernanto. Partizano. Mortigita apud v. Muhovo (6. VIII. 1944).

Pernik

52. *Ivan Garvanov* — nask. 3. I. 1912 en Pernik. Teknikisto. Sekretario de RK de RMS, membro de DK de BKP en Sofio. Pereis en Pernik (19. III. 1944).

53. *Netrit Kuzmanov* — nask. 20. I. 1912 en v. Belica. Laboristo en Sofio. Martire mortigita en la policejo de Belica (3. V. 1944).

Pleven

54. *Vasil G. Topalski* — nask. 17. IX. 1907 en Pleven. Ŝuisto. Sekretario de DK de BKP. Politika malliberulo dum kelkaj jaroj. Pereis en la flamoj de sia domo, bruligita de la polico (30. III. 1942).

55. *Cvetan Spasov* — nask. 1. XI. 1919 en Pleven. Poeto kaj publicisto. Sekretario de DK de RMS. Politikomisaro de partizana taĉmento. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico en Pleven (14. II. 1944).

56. *Slavi Aleksiev* — nask. 3. VIII. 1914 en u. Marica, loĝis en Pleven. Membro de DK de BKP. Partizana komandanto. Pereis en pafbatalo kontraŭ la polico en Pleven kune kun Cvetan Spasov (14. II. 1944).

57. *Mara Denčeva Zlatareva* — nask. 8. VII. 1914 en Pleven. Presistino. Membro de DK de BKP. Mortigita terurmaniere (17. IV. 1944).

58. *Adil Derviŝev* — nask. 10. VIII. 1906 en Pleven. Kudristo. Membro de DK de BKP. Dum kelkaj jaroj politika malliberulo. Mortpafita je la 28. IV. 1944.

Plovdiv

59. *Ĥristo Kočev* — nask. 6. III. 1906 en v. Doskot. Tabaklaboristo. Sekretario de DK de BKP en Plovdiv, membro de CK de BKP. Mortigita en la Direkcio de la Polico en Sofio (5. XI. 1931).

60. *Mitko Surlev* — nask. 2. XI. 1907 en v. Grubovci, loĝis en Plovdiv. Ak-

tivulo de BKP. Mortpafita embuske (3. VI. 1933).

61. *David Sasonov* — nask. 24. XII 1908 en Asenovgrad. Komercoficisto. Esperanto-tradukisto. Mortis en politika ekzilo (13. IX. 1942)

62. *Georgi Ječev* — nask. 24. VI. 1904 en u. Harmanli, loĝis en Plovdiv. Membro de DK de BKP. Komandanto de II partizana teritorio. Pereis en longedaŭra pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj apud v. Pärvenec (30. VI. 1943).

63. *Kosta Atanasov Aleksandrov* — nask. en 1911 en u. Plovdiv. Laboristo. Komandanto de partizana taĉmento Pereis je la 20. VI. 1943.

64. *Stojan G. Ŝiŝkov* — nask. 23. VIII. 1923 en u. Plovdiv. Laboristo. Gvidanto de batalgrupo, poste partizano. Pereis en longedaŭra pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj apud v. Pärvenec (30. VI. 1943).

65. *Nedelčo K. Nedelčev* — nask. en 1905 en v. Vidrare. Pereis proksime de v. Domljan (28. XI. 1943).

66. *Dimitr St. Petrov (Fanteto)* — nask. 27. III. 1914 en v. Starosel, loĝis en Plovdiv. Membro de DK de RMS. Politika malliberulo. Politikomisararo de partizana taĉmento. Pereis en Rodopi-montaro (1. III. 1944).

67. *Ivan At. Filev* — nask. 26. XII. 1919 en v. Sotir, loĝis en Plovdiv. Elektroteknikisto. Komandanto de partizana taĉmento. Falis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj ĉe la bordo de rivero Văca (1. III. 1944).

68. *Rajčo Kostov Germanov* — nask. 18. IV. 1908 en v. Livadica, loĝis en Plovdiv. Laboristo. Partizano. Pereis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj en Rodopi-montaro (2. III. 1944).

69. *Vasil Kirjakov* — nask. 4. III. 1923 en Plovdiv. Tabaklaboristo. Partizano. Pereis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj en Rodopi-montaro (3. III. 1944).

70. *Cvetan G. Cvetanov* — nask. 23. III. 1922 en Plovdiv. Komandanto de

partizana taĉmento. Pereis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj en Rodopi-montaro (3. III. 1944).

71. *Todor Sofroniev* — nask. 4. XI. 1910 en Plovdiv. Kudristo. Dum certa tempo politika malliberulo. Helpanto de partizanoj. Mortigita en Rodopi-montaro (1. VI. 1944).

72. *Argir Stoilov* — nask. 5. VI. 1921 en v. Uzunĝovo, distrikto de Haskovo. Loĝis en Plovdiv. Tabaklaboristo. Politika komisararo de partizana brigado. Falis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj en Rodopi-montaro (4. VI. 1944).

73. *Vlado G. Cvetanov* — nask. 9. XII. 1924 en Plovdiv. Helpanto de partizanoj. Mortpafita proksime de v. Pärvenec (8. VI. 1944).

74. *Kiril Kostadinov Tomov* — nask. 18. I. 1918 en v. Brestovica. Vickomandanto de partizana taĉmento. Pereis en pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj (16. VI. 1944).

75. *Rajčo Kirkov* — nask. 12. VII. 1906 en v. Dragojnov. Tabaklaboristo. Membro de DK de BKP, politika-vickomisararo de II-a partizana teritorio. Falis en pafbatalo kontraŭ la polico apud Plovdiv (26. VI. 1944).

76. *Spiro Iv. Vasilev* — nask. 20. XII. 1922 en v. Kruŝevo. Loĝis en Plovdiv. Presisto. Partizano. Mortpafita proksime de v. Hrabrino (5. VIII. 1944).

Ruse

77. *Andrej Jordanov Nenov* — nask. 28. I. 1911 en v. Pejĉinov. Etkomerco. Helpanto de partizanoj. Mortpafita apud v. Bosilkovci (21. VI. 1944).

Smoljan

78. *Dičo Petrov* — 17. XI. 1919 en v. Progled. Instruisto. Komandanto de fama soldata partizana taĉmento „Hr. Botev“. Pereis en granda pafbatalo kontraŭ policianoj kaj soldatoj apud v. Batulija, distrikto de Sofio (23. V. 1944).

79. *Kiril Maĝarov* — nask. 16. III. 1914 en Smoljan. Poeto. Sekretario de RK de BKP. Partizano. Pereis proksi-

me de u. Kurŝumliĵ, Jugoslavio (14. VIII. 1944).

80. *Bratan Ŝukerov* — nask. 12. II. 1912 en Smoljan. Dentkuracisto. Komandanto de partizana taĉmento. Grave vundita je la 3. IX. 1044, mortis post la popola venko (23. IX. 1944).

Sofia

81. *Angel Petkov (Anĝelo)* — nask. 2. VII. 1909 en u. Orjaĥovo, loĝis en Sofia. Ĵurnalisto. Kunlaboranto de CK de BKP, membro de CK de Laborista Esperanto-Asocio. Mortis en la malliberejo (13. VI. 1941).

82. *Hristo Nikov* — nask. 27. IV. 1911 en u. Samokov, loĝis en Sofio. Sukerajisto. Membro de DK de BKP. Organizanto de batalgrupoj en Sofio. Mortigita en la Direkcio de la Polico (1. X. 1941).

83. *Nikola Botuŝev* — nask. 28. VIII. 1897 en u. Sliven. Instruisto. Sekretario de DK de BKP en Burgas, poste loĝis en Sofio. Gvidanto de batalgrupoj en Sofio. Mortkondamnita, pendumita (15. XI. 1941).

84. *Nikola Ŝopov* — nask. 5. XI. 1912 en u. Tesaloniko, Grekio, loĝis en Sofio. Sukerajisto. Sekretario de Laborista Esperanto-Asocio. Partoprenis batalgrupojn en Sofio. Mortkondamnita, pendumita (15. XI. 1941).

85. *Atanas Nikolov Angelov* — nask. 19. II. 1920 en u. Balĉik, loĝis en Sofio. Gvidanto de batalgrupoj. Mortkondamnita, pafmortigita sur la Militista Pafejo, Sofia (14. X. 1943).

86. *Penka Miĥajlova* — nask. 12. XII. 1914 en u. Teteven. Tramistino. Membro de RK de Komsomolo. Suferis prizonon. Partizanino. Mortpafita apud Radomir (12. V. 1944).

87. *Stilijan Peŝev* — nask. 30. VII. 1920 en Sofia. Studento. Aktivulo de BONSS. Partizano. Mortpafita (6. VI. 1944).

88. *Valentin Andreev* — nask. 28. XII. 1917 en Sofia. Studento. Instruikianto ĉe CK de RMS. Partizano. Mortigita

proksime de v. Potop (18. VI. 1944).

89. *Emil Ŝekerĝijski* — nask. 6. IV. 1912 en u. Dupnica, loĝis en Sofia. Ĵurnalisto. Kunlaboranto de CK de Komsomolo. Partizano. Pereis en pafbatalo kontraŭ polico apud v. Zlogoŝ, distrikto de Kjustendil (3. VIII. 1944).

90. *Velislav Dramov* — nask. 23. I. 1919 en u. Vraca, loĝis en Sofia. Studento. Aktivulo de BONSS. Partizana komandanto. Grave vundita en pafbatalo kontraŭ policanoj, mortis pro la vundoj en Balkan-montaro proksime de Sliven (5. VIII. 1944).

91. *D-ro Stojan Vasilev* — nask. 15. IV. 1917 en v. Stojanovci, distrikto de Vraca, loĝis en Sofia. Kuracisto. Komandanto de partizantaĉmento. Pereis en longedaŭra pafbatalo kontraŭ policanoj kaj soldatoj (26. VI. 1944).

92. *Mariĵka Iv. Gavrilova* — nask. 10. IV. 1912 en u. Etropole. Kunlaboris al CK de BKP. Mortpafita en Balkan-montaro (31. XII. 1943).

93. *Trifon N. Hristovski* — nask. 24. I. 1903 en v. Radotina. Publicisto. Sekretario de la loka organizo de BKP. Malsana. Kruele persekutita de la polico, mortis je la 17. V. 1944.

Stara Zagora

94. *Bontjo Ŝanov* — nask. 27. VII. 1896 en u. Pazarĝik. Advokato. Gvidanto de Septembra Kontraŭfaŝista Ribelo en 1923 en la regiono de Kazanlâk. Mortigita je la 26. IX. 1923.

95. *Atanas Mitev* — nask. en 1913 en Stara Zagora. Lernanto. Membro de RK de Komsomolo. Mortigita en policejo (3. IV. 1934).

96. *Ivan V. Grudev* — nask. 2. VIII. 1914 en Stara Zagora. Lernanto. Membro de RK de Komsomolo. Mortigita embuske sur Balkan-montaro (5. VII. 1934).

97. *Ĵeljo Dimanov* — nask. 7. X. 1907 en Stara Zagora. Laboristo. Membro de BKP. Falis en interpafado kun la polico en sia naskiĝurbo (15. VIII. 1934).

98. *Dinko T. Bozev* — nask. 6. V. 1916 en v. Kalojanovec. Terkulturisto. Sekretario de RK de Komsomolo. Pereis en interpafado kun la polico (20. X. 1935).

99. *Denjo Iv. Denev (Tribunĉika)* — nask. en 1914 en v. Haĝi Dimitrovo. Poŝtoficiŝto. Falis en pafbatalo kontraŭ la polico sur Balkan-montaro (5. V. 1935).

100. *Petr Dimov Jonkov* — nask. 25. II. 1914 en v. Târniĉene. Laboristo. Partoprenis la Internacian Brigadon en Hispanio. Falis por la libero de la hispana popolo (14. VII. 1938).

101. *Nako Kolev* — nask. 8. V. 1916 en v. Tuŝin, loĝis en Stara Zagora. Sekretario de DK de Komsomolo. Partizano. Pereis en interpafado kun la polico en v. Kirilovo (7. III. 1942).

102. *Cvjatko Radojnov* — nask. 23. II. 1893 en v. Krân. Instruisto. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝistan Ribelon en 1923. Multjara politika elmigrinto en USSR. Partoprenis la batalon de la hispana popolo por libero en la vicoj de la Internacia Brigado. Reveninte kaŝe en la patrujon, li fariĝis membro de CK de BKP kaj gvidanto de la Centra Partia Komisiono por perarmila kontraŭfaŝisma batalo. Mortkondamnita, pafita sur la Militista Pafejo en Sofia (26. VI. 1942).

103. *Marko Iv. Petârĉev* — nask. 20. VIII. 1914 en v. Dâlboki. Laboristo. Sekretario de DK de Komsomolo. Mortkondamnita kaj pendumita (22. X. 1942).

104. *Dimitr Blagoev Dimitrov* — nask. 12. III. 1907 en v. Opâlĉenec. Terkulturisto. Membro de RK de BKP. Politika Komisar de partizana trupo. Mortigita apud v. Begovo, distrikto de Plovdiv (10. XI. 1043).

105. *Kunĉo Kolev Kunĉev* — nask. 7. VI. 1915 en v. Târniĉene. Instruisto. Helpanto de partizanoj. Mortpafita en Plovdiv sen kia ajn juĝproceso (14. XI. 1943).

106. *Nedelĉo Karaivanov* — nask. 28. IV. 1914 en v. Târniĉene. Instruisto. Helpanto de partizanoj. Mortpafita en

Plovdiv sen kia ajn juĝproceso (14. XI. 1943).

107. *Kunĉo Tonĉev Kunĉev* — nask. en 1914 en v. Ĉerkova. Terkulturisto. Membro de RK de BKP. Politika malliberulo. Partizano. Pereis je la 5. VII. 1944.

Ŝumen

108. *Vela Piskova* — nask. 28. XI. 1889 en Veliko Târnovo. Instruistino. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝistan Ribelon en 1923. Sekretariino de DK de BKP en Sumen. Pereis en interpafado kun la polico en Ruse (29. III. 1925).

109. *Ivan Kânĉev* — nask. 11. VI. 1911 en v. Probuda, distrikto de Târ-goviŝte, loĝis en u. Preslav. Maŝinisto. Sekretario de RK de BKP. Mortpafita de la polico (16. XII. 1943).

110. *Dimitr Hr. Kamburov* — nask. 26. XI. 1900 en v. Palatica (nun Kamburovo). Instruisto. Sekretario de RK de BKP. Politika komisar de partizana taĉmento. Falis en pafbatalo kontraŭ la polico sur Balkan-montaro (26. I. 1944).

Varna

111. *Sâbi Diĉev* — nask. 11. X. 1911 en v. Vâlĉi Dol. Elektroteknikisto. Sekretario de DK de BKP. Politika elmigrinto. Partoprenis Internacian Brigadon en Hispanio kaj batalis por la libero de la hispana popolo. Gvidis batalgrupojn en Sofio. Pereis en interpafado kun la polico en Sofio (25. VI. 1943).

112. *Stojan Dobrev (Stranĝata)* — nask. 12. VII. 1915 en v. Kiĉevo. Sekretario de DK de Komsomolo. Organizanto de batalgrupoj en Varna. Partizano. Pereis en interpafado kun la polico en v. Bâlĝarovo, distrikto de Burgas (15. XII. 1943).

Veliko Târnovo

113. *Dimitr Miĉev Nedev* — nask. 19. IX. 1904 en v. Dâskot. Mortigita apud v. Rusalja (25. VI. 1925).

114. *Hristo Kozlev* — nask. 24. VI. 1910 en v. Dolna Orjahovica. Kudristo.



JUBILEA AKTIVECO DE LA ESPERANTISTOJ

STREĈA LABORO DUM LA
JUBILEA JARO

El informo al CK de BEA

Dum la jubilea jaro nia E-Societo „Eterna Amikeco“ en u. Pleven streĉis la fortojn kaj ni atingis bonajn sukcesojn.

En lernejo „Petr Beron“ komenciĝis fakultativa instruado de Esperanto al ĉ. 100 lernantoj. La junpioniroj preparis bonan programon kaj partoprenis la feston de la revolucia E-poezio kaj kanto en u. Kazanlāk. La esperantista lernantaro partoprenis en aparta kolono la tutpopolan manifestacion je la 24-a de majo — la amata festo de la bulgaraj skribo kaj kulturo. Reprezentanto de nia societo partoprenis la amasan marŝon laŭ la paŝoj de la partizanoj el taĉmento „Antonivanovci“ kaj poste dividis siajn impresojn kun la junaj esperantistoj. Du grupoj da lernantoj sinsekve pasigis po du semajnoj en la E-tendaro apud v. Druŝevo, en la Balkano. Ĉirkaŭ 90 gelerntoj kun instruistoj partoprenis E-tendaron en Hungario.

Apud u. Pleven en la bela loko „Cernjalka“ ni organizis renkontiĝon de esperantistoj kun belarta programo.

La estraro de la societo starigis la taskon kolekti fotojn de esperantistoj el nia distrikto, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo.

Dum la aŭtuno nia ĉefa tasko estas: vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, daŭrigi la funkciadon de la konversacia E-rondo, varbi sufiĉan nombron da novaj gekursanoj.

E-AKTIVECO EN PAZARĜIK

Dum la jubilea 1974 jaro la esperantistoj el la distrikto de Pazargik havas notindajn sukcesojn. Ili realigis multjaran revon — konstrui propran klubojn.

Dediĉe al la glora datreveno ni organizis grandan renkontiĝon de esperantistoj el la distriktoj de Pazargik kaj Plovdiv en u. Peŝtera por celebri la esperantiston Teofil Daŝinov, pereintan en la Civitana Milito en Hispanio (vidu n-ron 9 de „B. E.“).

En u. Velingrad ni organizis celebron dediĉitan al la pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo Vela Peeva, Stoju Kalpazancv kaj Angel Ĉopev (vidu n-ron 7-8 de „B. E.“).

La membroj de la E-societoj en la distrikto partoprenis la aranĝojn de la aliaj amasaj organizaĵoj, dediĉitajn al la 30-a Jubileo de la Revolucio, speciale la aranĝojn de la Patrolanda Fronto. Amase ili partoprenis ankaŭ la socialisman laborkonkuradon lige kun la Jubileo.

Ni eltrovis la adresojn de tri esperantistoj el la regiono de Stavropol (USSR), kun kiu la distrikto de Pazargik interfratiĝis, kaj ni komencis korespondi kun ili.

Kvar el niaj samideanoj vizitis la kongreson de la slovakaj esperantistoj en u. Martin.

La Distrikta E-Komitato varbis 15 gejunulojn por la internaciaj Pedagogiaj E-kursoj en Burgas (Meden Rudnik) kaj 3 por la Internaciaj E-kursoj en Pisanica, Smoljan-distrikto. Nun ni kolektas fotojn kaj materialojn por aranĝi konstantajn angulojn memore al la pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo esperantistoj de nia distrikto.

K. Konstantinov

NAŬSEPTEMBRA SOLENAĴO EN SOFIO

Centojn da esperantistoj kunvenigis la solena vespero, dediĉita al la 30-a jubilea datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario. La solenaĵo estis organizita de CK de BEA.

Sekretario de DK de komsomolo. Komandanto de partizana taĉmento. Pereis je la 7. I. 1944 ĉe akcidento.

Vraca

115. *Kostadin Samarĝijski* — nask. 12. IV. 1912 en Vraca. Aktivulo de

BKP. Kiel kursanto en militista lernejo mortigita je la 12. X. 1933.

116. *Jordan Ljutibrodski* — nask. 30. V. 1911 en Vraca. Laboristo. Sekretario de DK de BKP. Instrukiinto ĉe CK de Komsomolo. Mortkondamnita, pendumita je la 9. V. 1935.



de la Sofia Distrikta E-Komitato kaj la urba E-Societo „Maksim Gorkij“ en Sofio. Paroladon lige kun la granda festo faris la membro de la Estraro de BEA Nano Kjučukov. Li pentris la bildon de supreniro de nia patrolando dum la tridek jaroj da popola regado en ĉiuj sferoj de la socia vivo — ekonomiko, scienco, kulturo. Aparte li notis la grandajn sukcesojn de la bulgara E-movado, morale kaj materiale subtenata de la popola ŝtato kaj de nia tuta socio.

Antaŭ la kunveno estis legitaj kaj sciigitaj la tekstoj de saluttelegramoj kaj leteroj de alilandaj E-asocioj, sciencistoj, grupoj kaj apartaj esperantistoj.

Plenumita estis riĉa belarta programo de artistoj kaj amatoroj. Altiris la atenton de la publiko du junaj amatoraj recitantinoj — Morjana Váleva kaj Ĵorĵeta Zdraveva. Apartan plezuron havigis la artistino de la Bulgara E-Teatro Petăr Vučkov kaj Anani Javašev, kiuj prezentis fragmenton el la komedio de Beaumarchet (Bomarshe) „La barbiro de Sevilja“, ludita kun granda sukceso en la 59 UK de Esperanto en Hamburgo. Kun vera ĝuo estis akceptita la recito de la poemo „En la trankvila vespero“ de Valeri Petrov fare de la artistino Belka Beleva. Tondrajn aplaŭdojn provokis la operkantisto Veselin Damjanov, kiu plenumis kantojn en Esperanto, bulgara kaj rusa lingvoj. Partoprenis la programon per deklamo ankaŭ Vasja Petrova.

G. Dolapčiev

Solena kunveno en Ruse

La urba Esperanto-Societo „Libero“ en Ruse organizis solenan kunvenon okaze de la 30-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en Bulgario. La vizito estis amasa. Estis prezentita konvena belarta programo.

La kunvenon partoprenis ankaŭ fremdlandaj gastoj — la geedza japana paro Huĝimoto el ŭ. Kioto kaj s-ino Jono Koble, denaska esperantistino el Leipzig, GDR. La gastoj salutis entuziasme la ĉeestantojn kaj tio donis internacian spiriton al la kunveno.

B. Kavalĝiev

Viva estas la memoro pri la heroo Marko Ivanov

La 22-an de oktobro ĉ. j. en v. Dălboki, distrikto de Stara Zagora, okazis kunveno memore al Marko Ivanov Petărčev, esperantisto, pendumita la 22-an de oktobro 1942 kiel sekretario de la Distrikta Komitato de la Laborista Junulara Unuiĝo en Stara Zagora.

La kunvenon organizis la loka E-societo kaj la junkomunistar organizaĵo en la vilaĝo. Pri la vivo kaj la revolucia agado de la heroo parolis Ivan Demirev — partia sekretario, esperantisto, kaj Rajno Ĉipilev — prezidanto de

IV FOIRA INTERNACIA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN PLOVDIV

Okaze de la glora 30-jara jubileo de la Socialisma Revolucio en Bulgario enkadre de la XXX Jubilea Internacia Foiro en urbo Plovdiv je la 8—10 de septembro okazis la IV Foiro Internacia Esperantista Renkontiĝo. Tiun ĉi aranĝon partoprenis pli ol 120 geesperantistoj el nia lando kaj 36 gastoj el aliaj landoj (Pollando, GDR, Anglio, Grekio, Finnlando, Hungario). Pro tio ĝi ricevis vere internacian karakteron.

La renkontiĝo estis organizita de la Distrikta E-komitato en Plovdiv. La kancelario de la vicestro de la fervojstacio estis je dispoŝo de la Komitato por akcepto de la esperantistoj. Por ili la Komitato engaĝis studentajn loĝejojn kun belaj kaj oportunaj 3-litaj ĉambroj.

La 8-an de septembro okazis interkona vespero en restoracio „Leipzig“. La sekretariino de la Komitato Fani Miĥajlova per kelkaj vortoj bonvenigis la partoprenantojn kaj deziris al ili argablan pasigon de la tempo en la urbo.

La 9-an aniaŭtagmeze la esperantistoj ĉeestis la tradician, nun pli solenan ol antaŭe, festmanifesteron. La eksterlandaj gastoj estis proksime de la tribuno por pli bone observi la manifestacion. Posttagmeze okazis komuna vizito al la vidindaĵoj de la urbo.

La saman tagon okazis Literatura Vespero Malfermis ĝin la artistino Vesa Kurteva. La vicprezidanto de la Distrikta Esperanto-komitato Jordan Angelov faris paroladon. La programo konsistis el deklamadoj, kantoj kaj filmo prezentanta la pasintcon de nia lando.

Je la 10-a, la lastan tagon, la partoprenantoj trarigardis la multnombrajn ekspoziciajn pavilonojn de la Foiro. Ĉiuj forveturis kontentaj pri tiu bela renkontiĝo.

M. Conkovski

la Distrikta Komitato de BEA en Stara Zagora.

Junpionira ensemblo plenumis belartan programon.

Kolju Kondov

sekretario de la E-societo en v. Dălboki

Prelego antaŭ specialistoj

La Societo de la Sciencoteknika Asocio kaj la loka Esperanto-Societo „Balkana Stelo“ en Trojan organizis la 18-an de oktobro ĉ. j. kunvenon de inĝenieroj kaj teknikistoj. Prelegis inĝ. Bojidar Leonov el Kŝrlovo je temo „Esperanto kaj la teknika progreso“.



EN SMOLJAN-DISTRIKTO ONI VIGLE REKONSTRUAS LA IDEEDUKAN E-LABORON

La 21-an de septembro ĉ. j. en Pamporovo okazis interkona vespero de la E-aktivularo el la distrikto de Smoljan kaj la ripozantaj tie esperantistoj el nia lando kaj el Pollando, Hungario, GDR kaj Ĉeĥoslovakio. Salutis la ĉeestantojn Zahari Ivanov — en la nomo de CK de BEA, kaj la gvidantoj de la apartaj naciaj grupoj. En la nokto sonis Esperantaj kaj bulgaraj kantoj. Sub la sonoj de unuagrada orkestro oni vigle dancis popolajn kaj modernajn dancojn.

La sekvan tagon okazis plenkunsido de la Distrikta E-Komitato. Raporton pri la ideologia laboro de DK faris ĝia sekretario Stefan Pavlov. Li substrekis, ke la tuteca ideeduka kaj kultur-amasa agado de DK, de la E-societoj kaj de la apartaj esperantistoj en la distrikto rekonstruiĝas konekse kun la novaj postuloj, starigitaj de la Maja Plenkunsido de CK de BEA. La esperantistoj per praktika laboro manifestas sian patriotismon kaj internacismon. Post la 38-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj, kiu okazis en Smoljan en 1972, estis elektita speciala komisiono por pli aktiva kaj celdirekta laboro. Gravan rolon tiurilate ludas la efektivigitaj aranĝoj — festivaloj, recitaloj, renkontiĝoj, laborbrigadoj k. s., en kies programoj regas la spirito de nia heroo historio kaj la revoluciaj atingoj en la konstruado de socialismo en nia lando.

En la distrikto de Smoljan oni strebas likvidi la memcelan lernadon de Esperanto, kontraŭstari tendencojn malamikajn al la socialismo, plifortigi la ateisman edukon de la esperantistoj. Oni atente observas kaj helpas la internacian korespondadon. Komenciĝis laboro prepare de albumoj kaj historia skizo de la E-movado en Mezaj Rodopoj. La internaciaj E-aranĝoj — kursoj, somerumado, vintra semajno — altiris ĉiam pli da eksterlandaj gesamideanoj. Dum la lastaj 5 jaroj en ili partoprenis 648 gastoj. Nun, kiam DK jam disponas pri propra instru-bazo en v. Pisanica, ilia nombro kreskas pli rapide. Ĝis nun venis esperantistoj el USSR, Pollando, Hungario, ĈSSR, GDR, Rumanio, Jugoslavio, Britlando, Francio, Usono, Hispanio, Grekujo, Italio, Kamboĝo, Bangladeŝo, Hindujo.

La tuta agado de DK de BEA en Smoljan rekonstruiĝas laŭplane kaj fariĝas grava fak-

toro por pli iltigo de la socialisma konscio de la esperantistoj.

La planprojekto por la internacia agado de DK estis raportita de Jordan Jordanov — la prezidanto.

Post viglaj diskutoj la Plenkunsido akceptis direktivojn por la estonta ideeduka laboro en la distrikta E-organizaĵo kaj planon por internacia agado dum 1975.

Por la partoprenantoj en la plenkunsido kaj la ripozantaj gastoj estis aranĝita ekskurso al la kanjono de Trigrad.

Maria Diĉeva

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ EI TROJAN KAJ PAZARĜIK

Dekses esperantistoj, membroj de E-Societo „Balkana Stelo“ en urbo Trojan, partoprenis renkontiĝon kun la esperantistoj de u. Pazarĝik, kiu okazis je la 10–11 de septembro ĉ. j.

Je la fiksita tago kaj horo ni alveturis al Pazarĝik, kie nin atendis granda grupo de lokaj samideanoj. Ni estis enloĝigitaj kaj poste akompanitaj al diversaj vidindaĵoj de la urbo: la preĝejo „Sankta Virgulino“ kun majstre skulptita ligna altaro, la muzeo de la pentristo Stanislav Dospevski — el la epoko de la bulgara renesanco, la Distrikta Muzeo, la insulo de rivero Marica k. a.

Aparte fortan impreson faris al ni la bone aranĝita el fotoj kaj diagramoj ekspozicio pri la atingoj de la urbo kaj distrikto dum la 30 jaroj da socialisma disvolvigo. Tiu, kiu konas la urbon en la pasinteco, plej bone povas konstati la mirindajn ŝanĝojn: Pazarĝik jam fariĝis nuntempa, bonaranĝita urbo kun evoluinta industrio, grandbienata kaj modernigita agrikulturo, kun dramteatro, simfonia orkestro k. a.

La vesperon ni kolektiĝis en la novkonstruita kaj lukse meblita klubejo de E-societo „Radio“, en la centro de la urbo. Venis multaj lokaj esperantistoj. Okazis kunveno, en kiu Konstantin Genĉev faris prelegon pri la pasinteco kaj la estonteco de Pazarĝik kiel ekonomia kaj

Grupo de junpioniroj el Smoljan-distrikto, kiu partoprenis internacian E-tendaron arud Balatono, Hungario, 1974. Ambaŭflanke staras la E-instruistinoj Julia Blagoeva kaj Blaga Despotova.



kultura centro, situanta en la mezo de la Balkana Duoninsulo, apud la internaciaj ĉefvojoj — ŝoseo kaj fervojo de Okcidenta kaj Meza Eŭropo al la Proksima Oriento.

K. Genčev parolis ankaŭ pri la E-movado en la distrikto, kies atingoj starigas ĝin en la unuaj vicoj de la E-movado en la lando. Dank'al sia aktiva partopreno en la kontraŭ-faŝisma batalo kaj nun en la socialisma konstruado la E-Movado en Pazarĝik kaj ĝia distrikto ĝuas sufiĉe altan aŭtoritaton antaŭ la ŝtataj kaj publikaj organoj en la urbo, antaŭ la tuta socio. Tiu fakto certe favoris ankaŭ la konstruadon de la propra E-klubejo, kiun oni inaŭguris komence de junio ĉ. j.

E-KURSOJ KOMENCIĜIS MULTLOKE

Smoljan

La prezidanto de la Distrikta E-Komitato en Smoljan Jordan Jordanov telefonis al la asocia kancelario:

La nova lernejo en la urbo kaj la distrikto komenciĝis tre sukcese. En la urbo mem estas 6 E-kursoj kun 148 gekursanoj. Du el ili estas lernejaj klasoj.

En 7 loĝlokoj de la distrikto funkcias 23 kursoj kun 480 gekursanoj.

Sume en la distrikto de Smoljan nun funkcias 29 kursoj kun 628 kursanoj. La nombro de la lernejaj klasoj estas 13.

Boljaroŭo

La 15-an de oktobro en la nova urbo Boljaroŭo, distrikto de Jambol, estis malfermita Esperanto-kurso.

Sofio

La 3-an de oktobro kurson por komencantoj malfermis la urba E-Societo „Maksim Gorki“ kun 33 kursanoj. Kursgvidanto Nano Nanov.

Kurson por instruistoj, junuloj kaj civitanoj organizis la Instruista E-Societo „Dičo Petrov“. Partoprenas 28 personoj. Gvidas la kurson Marin Băcev.

La 10-an de oktobro solene malfermis la lernejon en unu el la salonoj de la Ministerio de la Transporto la fervojista E-societo „Hristo Botev“. Malfermita estas kurso kun 20 personoj. Kursgvidanto Simeon Hesapčiev.

Kurson malfermis ankaŭ la Fervojista E-Societo „Prospero“. Ejon por la kurso disponigis la Kulturdomo de la Fervojistoj. Aliĝis 23 kursanoj. Gvidas ĝin Simeon Hesapčiev.

La 17-an de oktobro komenciĝis ankaŭ la fakultativa Esperanto-instruado en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Ekfunkciis 2 grupoj: por komencantoj — kun 35 gestudentoj kaj por progresintoj — kun 15 gestudentoj. Iom poste komenciĝis ankaŭ suprema grupo kun 12 partoprenantoj. Gvidanto — Kunčo Vălev, universitata lektoro de Esperanto.

Nun la tasko estas: plenumi tiun klubejon per riĉa, varia agado, garantii pluajn sukcesojn en la divstavigo de Esperanto.

Ni opinias, ke ĉiuj esperantistoj devas konatiĝi kun la spertoj de niaj samideanoj en Pazarĝik, ĉar la tasko havigi propran klubejon staras antaŭ ĉiu E-societo. Estus hone, se CK de BEA ellaborus specialan instrukcion pri tiu grava kaj aktuala problem.

La samideanoj el Pazarĝik promesis veni gaste al Trojan en konvena por ili tempo. La renkontiĝo okazos en la bela loko Beklemeto.

V. Mitovski

BONAJ INTERNACIAJ LIGOJ

La esperantistoj de E-Societo „Trakia Lumo“ en urbo Marica subtenas bonajn ligojn kun la esperantistoj el USSR, GDR, ĈSSR, Hungario k. a. Aparte viglaj estas iliaj kontaktoj kun la samideanoj el urbo Rostock, GDR. Lige kun la morto de Walter Ulbricht, la prezidanto de la Ŝtata Soveto de GDR, ni sendis kondolencleteron al la E-grupo en Rostock. La tieaj esperantistoj aperigis nian leteron en sia Balta-Mara Informilo. Ni gratulis ilin okaze de la 25-a datreveno de la fondiĝo de GDR. Lige kun la 30-a jubilea datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario ili sendis al ni jenan leteron:

„Karaj gesamideanoj kaj kamaradoj!

La membroj de la Esperanto-grupo en Rostock, urbo ĉe Balta Maro, tre kore gratulas vin okaze de la 30-jara datreveno ekde forigo de la faŝismo en via lando je la 9-a de septembro 1944.

Ni esperas, ke neniam ĉesos nia komuna laboro por paco kaj popola interkompreniĝo en estonteco, por plibonigi la vivnivelojn de niaj ambaŭ popoloj! Krome ni deziras al la bulgara popolo sub la gvidado de via registaro kaj partio grandajn ekonomiajn, politikajn kaj kulturajn sukcesojn, por ke la faŝisma tempo neniam revenu!

Sincere salutas vin

PLATE

*sekretario de la Distrikta Laborando
Esperanto en Rostock**

Ni, la esperantistoj el urbo Marica, elkore dankas al niaj samideanoj en Rostock kaj ni volas certigi ilin, ke estonte ni laboros ankoraŭ pli vigle por la triumfo de nia komuna socialisma kaj paca idealo.

*Todor Kurtev
prezidanto de E-Societo „Trakia Lumo“*



REZULTOJ DE INTERFRATIĜO DE URBOJ

Nia urbo Vidin kaj la distrikto de urbo Ŝverin (Schwerin) en Germana Demokratia Respubliko interfratiĝis. Ankaŭ ni, la esperantistoj el tiuj du urboj, ekhavis kontaktojn inter ni.

En majo la samideanoj de Ŝverin lige kun la konferenco de la esperantistoj en la distrikto

invitis du personojn el nia societa estraro gastigi al ili. Similan inviton ili direktis al la E-rondeto „Amikeco“ en urbo Třebona (Ĉeĥoslovakio). Ni havis la plezuron viziti Ŝverin, partopreni la distriktan E-konferencon kaj fine subskribis interkonsenton pri komunaj aktivecoj. Kiel formo de agado ĝi povas utili al la esperantistoj ankaŭ aliloke.

Ignat Nikolov

INTERKONSENTO

pri kunlaboro inter E-Societo „Espero“ en Vidin (Bulgario), E-klubo „Amikeco“ en Ĉeska Třebona (ĈSSR) kaj Distrikta E-Laborrondo de Schwerin (GDR)

Por plibonigi la rilatojn inter la suprenomita Esperanto-organizo kaj trovi novajn eblecojn por uzi nian komunan lingvon ni interkonsentas jenon:

1. Ni regule interŝanĝos la gazetojn, kiuj aperas en Ĉeĥio, Bulgario kaj GDR, unualoke „Starto“, „Bulgara Esperantisto“ kaj „Der Esperantist“.

Aliajn informojn, kiujn eldonas la rondetoj kaj la distrikta laborrondo, ni same interŝanĝos.

Precipe ni informos nin reciproke pri ĉiuj okazintaĵoj en la vivo de niaj organizoj.

2. Ni informos nin reciproke ankaŭ pri ĉiuj novaĵoj en E-literaturo kaj serĉos eblecojn interŝanĝi ilin.

3. Ni subtenos la korespondadon inter niaj organizoj kaj membroj. Por la korespondado ni rekomendas diversajn demandojn, ekzemple:

— evoluo de la industrio kaj agrikulturo en la koncernaj distriktoj;

— la naturmedio de la homoj en la distriktoj: pureco de la akvo, aero kaj

tero;

— historio de la urboj, distriktoj kaj landoj;

— evoluo kaj historio de la E-movado en la urboj, distriktoj kaj landoj.

4. Ni subtenos ĉiumanierne la kontaktojn inter niaj organizoj: partopreno en diversaj aranĝoj, subteno de reciprokaj kolektivaj kaj individuaj vizitoj k. s. Por tio ni prizorgos anticipan korespondadon kaj precizigon pri la anoj aŭ grupetoj, kiuj volas fari viziton (aĝo, profesio, sekso, interesoj ktp.). La tri organizoj garantias, ke la vizitantoj parolas sufiĉe bone Esperanton kaj estas organizitaj membroj. Ĉe vizito de familioj almenaŭ unu familiano estu organizita esperantisto.

Pavel Batek *Ignat Nikolov*
sekretario de Esperanto-klubo „Amikeco“ en *prezidanto de E-Societo „Espero“ —*
Ĉeska Třebona *Vidin*

Hans Dietrich

prezidanto de la Distrikta Laborrondo Esperanto — Schwerin ĉe la Kulturligo de GDR

PREMIITAJ VERKOJ DE BULGARAJ ESPERANTISTINOJ

En la internacia literatura konkurso sub la aŭspicio de la literatura rondo „Patrolo“ (Italio) por 1974 j. partoprenis 21 geverkistoj el 14 landoj per 26 konkursaĵoj. Inter la premiitoj por ia branĉo prozo estis ankaŭ du bulgaraj esperantistinoj el Sofio:

NEVENA NEDELĈEVA — por la rakonto „Patrino“ — II premio kaj
PENKA BATOEVA — por la rakonto „Kapraj okuloj“ — III premio.

Ni gratulas niajn samlandaninojn!



★ juna esperantisto ★

LA XXX KONGRESO DE TEJO

De la 3 ĝis la 10 de aŭgusto ĉ. j. en la malnova historia urbo Münster (Federacia Respubliko Germanio) okazis la XXX kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Fondita en 6/4 j., monde konata pro la subskribo tie ĉi de la Vestfalia Packontaraktio en 1648, per kiu finiĝis la Tridekjara Milito, ĝuante popularecon kiel unu el la plej belaj urboj de Germanio, nun Münster estas ĉefurbo de Vest'alo. Ĝia loĝantaro nombras 200 000 homojn, 30 000 el kiuj estas studentoj.

La kongreson partoprenis pli ol 25) junaj esperantistoj el 28 landoj de la 5 kontinentoj. Ĝia ĉefa temo estis „Junularo kaj eduko“. Aktivis kelkaj laborgrupoj pri la temoj: „La junulara politiko kaj la internacia junulara kunlaborado“, „La cibernetiko kaj la Esperanto-instruado“, „Problemoj de la instruado de fremdaj lingvoj“, „La praktika instruado de fremdaj lingvoj“, „La praktika instruado kaj la edukado de l'junularo“, „Edukado en paco“, „La dinamisma studenta rondo“, „La laborplano de TEJO“.

La bulgara grupo konsistis el kvar reprezentantoj, inter kiuj du oficialaj — inĝ. Angel Todorov el Sofio, prezidanto de BEJ kaj Antonija Spasova el Haskovo, vicprezidanto de BEJ.

Kiel prezidanto de TEJO estis reelektita s-nino Flora Szabo (Hungario) kaj kiel sekretario oni elektis Bruneto Kassini (Italio).

En la nova estraro estis elektita ankaŭ inĝ. Angel Todorov — prezidanto de BEJ. Tiu fakto elokvente parolas pri la aŭtoritato, kiun ĝuas BEJ en la tutmonda junulara E-movado.

Post la kongreso ĉiuj junaj esperantistoj partoprenis unutagan ekskurson, dum kiu ili havis eblecon ĉeesti interesan popolan feston. La partopreno de esperantistoj en tiu festo kaj speciale ĝia finiĝo transformiĝis en manifestado de la amikeco inter la reprezentantoj de la kvin kontinentoj, de ilia volo vivi en paco.

INTERNACIA ARKEOLOGIA E-BRIGADO ĜE NIGRA MARO

De la 8 ĝis la 30 de aŭgusto ĉ. j. sur la promontoro Kaliakra ĉe Nigra Maro laboris Internacia Arkeologia E-Brigado. Ĝi havis la nomon de la kreinto de la Internacia Lingvo „D-ro L. L. Zamenhof“.

La brigado estis organizita de la Bulgara E-Junularo kun la helpo de la Distrikta E-Komitato en Varna. Ĝin partoprenis ĉ. 90 gejunuloj el 10 landoj: Bulgario, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Rumanio, Anglio, Italio, Jugoslavio, Sovetunio, Sudano.

La labortasko estis: fari arkeologiajn fosaĵojn. La brigadanoj malkovris antikvan fortikajmuron (el la II jarcento de n. e.), restaĵojn de kvarangulaj konstruaĵoj, diversajn vazojn, kandelingojn, virinornamaĵojn, monerojn k. m. a. Ĉiuj elfosajtoj atestas pri intensa vivo sur Kaliakra, pri alta spirita kaj materiala kulturo de ĝiaj loĝantoj dum la V—VI jarcentoj. Aparte interesaj estis la trovitaj oraj moneroj de la V jarcento. Ili estis tre bone konservitaj. La ĝojo havi tiajn elfosaĵojn estis des pli granda, ĉar ĝis nun ĉi tie oni ne trovis ormonerojn.

Estis trovitaj ankaŭ bone konservitaj argilajoj el la VI—VII j. c., orajn orelingojn, skeletojn de enterigitaj k. a.

Post la laborhoroj sekvis variaj programoj. La plaĝo estis apud la bazo mem. Oni sin banis, fiŝkaptadis, promenadis per boatoj.

Kelkfoje en la bazon venis la orkestro de la Junulara Domo en u. Tolbuhin kaj okazis gajaj amuzvesperoj. Plej interesa, kompreneble, estis la karnavalvespero kun la Festo de Nuptuno. Por tiu arango el Varna alveturis esperantistoj per speciala aŭtobuso. Ĵurio aljuĝis premiojn por la plej bonaj kostumoj kaj maskoj.

Por la fermo de la brigado venis reprezentantoj de la Distrikta Komitato de la Dimitrova Junkomunista Unuiĝo, de la Distrikta Konsilantaro por Arto kaj Kulturo, de la Distrikta Muzeo en Tolbuhin, de la Distrikta Komitato de BEA, k-do Nikola Aleksiev — la prezidanto de BEA, k. a.

Pro la bona laboro de la brigado la Distrikta Konsilantaro por Arto kaj Kulturo en Tolbuhin donis specialan diplomon al la Bulgara Esperanto-Junularo. Ĉiuj brigadanoj ricevis la insignon de la Distrikta Muzeo. La Estraro de BEJ kaj la gvidantaro de la brigado premiis la plej bone laborintajn brigadanojn per atestoj kaj donacoj kaj abonigis ĉiujn por la aktiva organo „Bulgara Esperantisto“.



Post la fermo de la brigado estis organizita tuttaga ekskurso al la enfluejo de rivero Kamčija en la maron, kie la brigadanoj noktumis en la luksaj bungalowoj de kampadejo „Raj“ (Paradizo).

Post la agrablaj tagoj de laboro, amuzoj kaj amika kunesto la junuloj forveturis al siaj landoj kaj hejmoj kun bronzkolora haŭto, plifortigintaj kaj pliriĉiĝintaj de novaj impresoj kaj de neforgeseblaj amikiĝoj.

ing. Angel Todorov,
prezidanto de BEJ

JUNULARA EKSURSO AL GABROVO

La 26-an de oktobro ĉ. j. grupo da membroj de la Studenta E-Societo „Vela Peeva“ ĉe la Sofia Universitato organizis ekskurson kun sciencia celo al urbo Gabrovo. Tiu ĉi urbo estas fama en la tuta mondo dank' al spritaj anekdotoj pri siaj loĝantoj, karakterizataj kiel grandaj ŝparemuloj kaj ruzuloj.

Ni veturis per rapidvagonaro laŭ la sudbalkana fervojo kaj antaŭ niaj okuloj malfermiĝis unu post alia la pitoreskaj vidaĵoj de la Roza Valo.

De Kazanlâk ni vojaĝis al Gabrovo per aŭtobuso, preterpasante la preĝejon-mouumenton de Šipka kaj la majestatan Monumenton de la Libereco sur montopinto Stoleto.

En Gabrovo ni renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, kun kiuj ni pasigis agrablajn vesperojn, ekmanante la urbon kaj ĝiajn loĝantojn.

La duan tagon ni vizitis la muzean vilaĝon Bojenci kaj trarigardis la antikvajn naciajn do-

mojn, konstruitajn en la pasinta jarcento en balkana arkitektura stilo. En la muzeo, aranĝita en unu el la domoj, ni konatiĝis kun la karakteriza interno de la popolaj loĝejoj.

Posttagmeze ni vizitis la etnografian kaj arkitekturan komplekson Etâr. Tio estas parko-muzeo situanta sur la bordoj de rivero Sivek. La muzeo ne estas ankoraŭ tute finita, sed ĝi jam havas ĉirkaŭ kvardek objektojn. La arkitektura ekspozicio konsistas el malnovtempaj domoj, riparitaj, rekonstruitaj aŭ translokigitaj el diversaj vilaĝoj. La muzea ensemblo estas formita de tri partoj.

En la unua estas la laborejoj kun tradiciaj maŝinoj, utiligantaj la akvan forton kiel motoron, ekz. fulejo, muelejo, tornilo por lignoplaĵoj kaj lignokruĉoj, mekanika akrigilo k. a. La dua parto prezentas ensemblon de loĝkonstruaĵoj kaj laborejoj, formantaj malnovan gabrovan straton. Tie estas lokitaj la atelieroj de ceramikisto, ledisto, peltisto, babuŝisto, barelisto k. a.

La tria parto, kiu ankoraŭ ne estas finpreta, prezentas vilaĝan domon kun mastrumkorto.

La Muzeo Etâr estas unika, ĉar ĝi estas viva. La majstroj de diversaj popolaj metioj montras al la vizitantoj, kiel la bulgaroj laboris kaj vivis en la pasinteco.

De Gabrovo ni forveturis plenaj de riĉaj impresoj pri la pasinta vivmaniero kaj kulturo de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Mihâla Rocmanova
ĉefa studentino en Sofia

DEK TAGOJN EN LA UNUA INTERNACIA TENDARA LERNEJO DE ESPERANTO EN PRIMOSTENO

Estis la lastaj tagoj de junio, kiam mi metis la pezan kofron sur la reton en kupeo de la rapida vagonaro al Jugoslavio. Mia celo estis Primoŝteno — internacia esperantista ripozloko, delonge konata al mi de multaj bildoj kaj priskriboj. Tie okazos Internacia Tendara Lernejo (ITL), organizita de la Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn, kiun partoprenas Aŭstrio, Bulgario, Italio, Hungario kaj Jugoslavio. La celoj de ITL estas:

1. Konстати la nivelon de praktika lingvoscio de la infanoj pere de lerneja kaj eksterlerneja programo;

2. Montri la efikecon de la Internacia Lingvo kiel interkomprenilo, kiu ebligas senperan kunlaboron inter diversnaciaj infanoj;

3. Kontroli la eblecon de la internacia lingvo

Esperanto peradi ĉe kulturaj, socipolitikaj kaj ĝeneralaj klerigaj temoj;

4. Ebligi al la pedagogoj kaj kunlaborantoj interŝanĝi spertojn kaj proponi praktikajn plibonigojn de tiespeca instruado.

Do, feliĉe mi atingis Šibenik. Ĉi tie rapide formiĝis grupeto de lernantoj kaj instruistoj, kiuj havis la saman celon — veturi al Primoŝteno. Baldaŭ la buso ekveturigis nin preter la maro, kaj ni kun sofo ekrigardis ĝian panoramon dekstre kun multaj malgrandaj insuletoj.

Baldaŭ ĝojaj ekkrioj atentigis nin pri la proksima Primoŝteno, kie la tendaro de la es-

Vigla estas la E-movado en la lernejoj de urbo Maĉan, Smoljan-distrikto.

Solene staras antaŭ la verda flago junpioniroj dum E-festo,



perantistoj fiero manifestadis sian ĉeeston per granda verda standardo, flirtanta je la vento. Kia belega neforgesebla vidaĵo! La tendoj mem aspektis kiel blankaj fungoj inter koniferaj arboj. Antaŭ ili brilis lazurkolora la maro.

Ricevinte tendon mi rapide vestis min en bankostumon kaj — al la maro! — por ĝui la freŝecon de ĝia klara akvo.

Estis jam tagmeze, kiam mi iris en la restoracion de la tendaro. Tie mi renkontis malnovajn E-amikojn kaj konatojn el aliaj konferencoj en Budapeŝto kaj en Maribor. Jen Peter Zlatnar, jen la direktorino de ITL Anja Hurčak, jen la sekretario Zadravec — ĉiuj kun rideto bonvenigis min. Aparte kortuŝa estis la renkontiĝo kun la instruistoj el Hungario kaj Italio. Kiujn mi konis el la pasintjara lerneja E-konferenco en Maribor. La salonego estis plenplena de infanoj, kiuj zumis kiel abeloj. Mi tuj eksentis la etoson de Esperantujo, la etoson de la Internacia Tendara Lernejo, kie mi devis resti kaj kunvivi dek tagojn.

Posttagmeze la infanoj iris sin bani en la maro, dum ni, la instruistoj, havis nian unuan kunsidon. Estis formitaj kvar klasoj el tri nacioj — hungaroj, italoj kaj jugoslavoj. Bedaŭrinde pro diversaj kialoj lernantoj ne estis venintaj el Bulgario. Mankis lernantoj ankaŭ el Aŭstrio. La klasĉambroj estis ornamitaj per diversaj bildoj, diagramoj kaj aliaj materialoj por la laŭtemaj lecionoj.

Post la vespermanĝo sur la apuda subĉiela teraso okazis Interkona vespero.

Tago dua

Ekskursata tago! Per tri grandaj busoj oni veturigis nin ĉiujn al la proksima malnova urbo Šibenik, poste — al la pitoreskaj akvofaloj de la rivero Krka. Tie ĉi ni restis la tutan posttagmezon. Oni promenis ĉirkaŭ la akvofaloj, ĝuis ilian belecon, ĝisstate ludis. La fotoaparatoj ne ĉesis klaki.

Tago Tria

Fakte ĝi estis la unua lernotago. Post l matenmanĝo en la sama salono la direktorino Anja Hurčak per kelkaj vortoj oficiale malfermis la lernejon. Parolis ankaŭ reprezentantoj de ĉiuj partoprenantaj landoj, kaj ankaŭ Ingusz Janos — en la nomo de ILEI. Kaj . . . la klasoj kune kun siaj klasestroj, klashelpantoj kaj la ceteraj instruistoj kaj lektoroj ekmarŝis al la lernejo mem, situanta en la mezo de la malnova malgranda urbeto. Unue ni pendigis grandan verdan standardon sur la alta fosto antaŭ la lernejo. Post kelkaj minutoj eksonis la lerneja sororilo. . . Komenciĝis la unua instruohoro de la unua internacia tendara Esperanta lernejo. La instruisto aŭ la lektoro envenas la klasĉambron kaj ekparolas esperantlingve . . . Ĉu la lernantoj komprenos lian paroladon kaj respondos al la demandoj? Post

kelksekunda silento ni jam vidis la unuajn levitajn manojn — signo, ke la infanoj jam komprenis, scias kaj volas respondi. . . Bona sukceso! Diversnaciaj infanoj, venintaj el diverslingvaj teritorioj, sidas kune unu apud alia kaj interkompreniĝas tiel facile nur en unu sola lingvo — en la internacia lingvo Esperanto! Sur niaj vizaĝoj estis videblaj ridetoj, montrantaj kaj nian kontenton, kaj nian fieron, kaj nian feliĉon. . .

Posttagmeze la infanoj ripozis kaj denove sin banis en la maro, kaj ni, la instruistoj, denove kunsidis por pridiskuti la unuan lernotagon kaj preparoli la sekvantajn instruohorojn.

Tagoj kvara kaj kvina

La samo okazis en la dua kaj la tria lernotagoj, nur la instruistoj kaj la lektoroj vizitis aliajn klasojn. La temoj de la instruataj lecionoj estis diversaj: fakaj (geografio, matematiko, E-literaturo, kantado, parolekzercoj), internacikulturaj (muziko, scienco, arto, literaturo, sporto), ŝciopolitikaj (Unuiginta Nacioj, UNESKO, UNICEF, FAO, Ruĝa Kruco, Sepa Kontinento, Internaciaj E-arangoj).

Tago sesa

Denove ekskursata tago! Sed ĉu ĝi vere realiĝos. Feliĉe la vento, kiu blovis dum la nokto, iomete tranĉviliĝis, kaj ni ekveturis sur la adriatikaj akvoj. Nun ni vidis la malnovan urbeton Primošteno el la maro, kaj ĝi iom similis al nia Târnovo, kies domoj ŝajne estas konstruitaj unu super alia. La fotoaparatoj komencis klaki, kaj tio ne ĉesis dum la tuta tago, dum la tuta veturado. . .

Unue ni vizitis la insulon Juneco, kie renkontis nin junuloj brigadanoj starantaj en du vicoj ambaŭflanke de la vojo, kndukanta al ilia tendaro. Per kantoj kaj salutkrioj ili manifestis sian amikecon, kiu transformiĝis poste en interŝanĝon de E-insignoj, emblemoj aŭ flagetoj — fare de niaj infanoj — kaj de pajlaj ĉapeloj — fare de la brigadanoj. Poste ili montris al ni la insulon kaj la estontajn ripozdomojn kaj hotelojn.

Posttagmeze la ŝipo forportis nin al la Sepa Kontinento, kie deko de niaj infanoj — la unuaj, kiuj metis piedon sur la insulon — lerte ekkuris al la proksimaj arboj kaj pendigis siajn verdstelajn flagetojn. Tiamaniere ni simbole konkeris la Sepan Kontinenton, do ĝi fariĝu centro de la esperantista junularo! Poste la infanoj prezentis mallongan programon kaj ĉiuj ekkantis la kanton de Ljudmila Jevsejeva pri la Sepa Kontinento, kiun ni fervore lernis antaŭe:

*Radiu hele ĉiu tag', ridetu sun', aromu vento
en la infana respublik' de l' nova, sepa
kontinento!*

Kompreneble, ni faris kelkajn fotojn por rememoro kaj. . . la ŝipo reveturigis nin al



nia tendaro en Primoŝteno preter multnombraj malgrandaj insuloj kaj insuletoj. La subiranta suno donis al la mara akvo malantaŭ ni oran koloron. Ĉu iu povus forgesi tiun ĉi belegan tagon?

Tagoj sepa kaj oka

Denove du lerneaj tagoj kiel la antaŭaj tri — plenaj de streĉo, plenaj de ĝojo! Nun la instruistoj kaj lektoroj estis aliaj kaj prezentis aliajn lecionojn. . .

Dum la lastaj tri tagoj ĉiuvespere la infanoj montris sian kapablecon kanti, danci, ludi, ŝerci ktp. Kaj la publiko, veninta el la najbaraj hoteloj, plejparte alilandanoj, kun granda intereso aŭskultis niajn E-kantadon, recitadon, skeĉojn, muzikon, folkloron. La lastan vesperon reprezentantoj de Radio Zagreb surbendigis dum du horoj la plej sukcesajn E-arangojn de diversaj naciaj grupoj.

Krome, la infanoj, helpataj de siaj gvidantoj, aranĝis belegan ekspozicion, kiun allogis ankaŭ la ripozantaj alilandanoj. Ankaŭ pri Bulgario estis speciala tabulo. Pri nia ITL skribis kelkaj naciaj gazetoj en Jugoslavio,

disaŭdigis informojn ankaŭ multaj radiostacioj.

Dum la tuta lerneja tempo aperis ses numeroj de la oficiala bulteno kun 14 paĝoj, entute en 120 ekzempleroj. Plejparte la infanoj aperigis siajn leterojn, travivaĵojn aŭ versaĵetojn, kiujn ili verkis dum la komuna vivo en la tendaro. Tial ĉiu kun granda intereso atendis la aperon de la sekva numero. . .

La estraro anticipe estis preparinta ankaŭ surŝtona emblemon, kaj ĉiu infano kun fiero portis ĝin sur sia vestaĵo. Apartaj instruistoj disdonis donacetojn al la infanoj.

Tago Naŭa

Tago lasta. Oni faris komunan foton de ĉiu klaso kaj de la instruistaro. La grupoj komencis reveturi hejmen. Longaj manpremoj, fortaj ĉirkaŭpremoj, kioj kaj eĉ larmoj estis videblaj ĉi-tage. De ĉiu flanko estis aŭdeblaj: Ĉis nova renkontiĝo en Bulgario!*

Marin Băceș

* En 1975 simila renkontiĝo enkadre de la kvinlanda Kunordiga Konferenco estos organizita en Bulgario.

TRA LA E★ MONDO

Scienca lingvistika konferenco en Moskvo

Strato Volhonka 18. En tiu ĉi malnova domo, kie troviĝas la Instituto de Rusa Lingvo, ĉi-jare okazis scienca konferenco, dediĉita al la temo „Scienca-teknika revolucio kaj funkciado de lingvoj en la mondo“.

Pli ol 50 referaĵojn tralegis sovetaj kaj eksterlandaj lingvistoj dum la plenaj kaj sekciaj kunsidoj. Por taksu, kiel diversflanka estis la enhavo de tiuj ĉi informoj, estas sufiĉe nur nomi kelkajn el ili.

Ekzemple la koresponda membro de la Soveta Akademio de Sciencoj E. Filin parolis pri la temo „La scienca-teknika revolucio kaj la problemoj de bilingvismo en la nuntempa mondo“. La doktoro de filologiaj sciencoj S. Ŝaumjan dediĉis sian raporton al la problemoj „La scienca-teknika revolucio kaj la sociolingvistika aspekto de la semantiko“, Doktoro E. Vereŝagin lumigis la problemojn „La sociolingvistika aspekto de la problemoj de interkultura komunikado“.

Inter la scienculoj, kiuj parolis pri diversaj problemoj de la lingvoscienco, estis ankaŭ hungara gasto — d-ro György Szépe. En la plenkunsido li legis la referaĵon „La Scienca-teknika revolucio kaj la problemoj de la lingvo de la scienco“.

Pri „la problemoj de la helpa artefarita lingvo en la epoko de la scienca-teknika revolucio“ prelegis en la plenkunsido la doktoro de filologiaj sciencoj, prezidanto de la Esperanto-Komisiono en la Unio de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando Mahomet Isaev. Li raportis pri la evoluo de la ideo de internacia lingvo kaj analizis la teoriojn pri la principoj, laŭ kiuj tiu ĉi lingvo devus esti konstruita. D-ro Isaev speciale analizis la evoluon de Esperanto. Li montris, ke en tiu ĉi evoluo estis periodoj de florado kaj periodoj de malleviĝo (dum la militoj). „Nuntempe, — konstatis M. Isaev, — oni povas observi novan antaŭenmarŝon en la agado de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Tio devigas la sciencistojn pli aktive labori en la sfero de interlingvistikaj problemoj.“

D-ro M. Isaev substrekkis, ke en la epoko de la scienca-teknika revolucio Esperanto elvokas grandan intereson — kaj praktikan, kaj teorian (ekzemple en la konstruado de helpaj internaciaj kodoj k. a.) La lingvo Esperanto povus esti larĝe uzata en diversaj sferoj de la homa agado — speciale en la scienca kaj kultura.



Ankaŭ aliaj sciencistoj, kiuj parolis dum tiu ĉi konferenco en siaj referaĵoj diversegrade lumigis la problemojn pri la internacia lingvo.

Georgij Korotkeviĉ
membro de la Komisiono de Sovetaj
Esperantistoj

III-A ĈESPERANTO-FESTIVALO EN OPAVA

En julio ĉ. j. en la bela urbo Opava (Ĉeĥoslovakio) okazis la III Esperanto-Festivalo, dediĉita al la 750-a datreveno ekde la fondiĝo de la urbo kaj al la verkaro de la eminenta ĉeĥa poeto Peter Bezruč, vivinta kaj verkinta en tiu ĉi urbo.

La festivalon partoprenis ĉ. 200 esperantistoj el ĈSSR kaj gastoj el la E-asocioj de GDR, Bulgario, Pollando. Reprezentantoj de tiuj asocioj salutis la festivalpartoprenantojn.

La inaŭguro estis farita per vespero dediĉita al la verkaro de Bezruč, en la belega domo-monumento de la verkisto. Artistoj el la loka teatro prezentis verkojn en Esperanto de Bezruč, Maĥa, Neruda, Volker, ankaŭ ariojn el la ĉeĥa klasiko en Esperanto.

En la laboro de la festivalo partoprenis Irjina Gabrielova — reprezentantino de la Ministerio de Kulturo de ĈSSR, kiu faris raporton je temo „La taskoj de la Esperanto-movado en la kultura politiko de la socialisma ŝtato“. Detlev Blanke (GDR) parolis pri la kunlaborado inter la socialismaj landoj.

En la kulturprogramo de la festivalo partoprenis loka E-horo, konsistanta el instruistinoj kaj oficistinoj, kaj kantiĥoro de la ministroj. Gastis ankaŭ vojaĝanta pola E-teatro.

Por la partoprenantoj en la festivalo estis aranĝitaj ekskursoj al montopinto Praded kaj al la muzeo de la militoperacio apud Ostrava.

Nenko Jonkov

Esperanto-tendaro sur la bordo de Volga

Ĉi-jare la 16-a Tutsovetia Esperanto-tendaro okazis sur la bordo de Volga proksime de u. Kineŝma, en bela pinarbaro. Perfekta organizo, bonega vetero, abundo de fungoj kaj sovaĝaj fruktoj — ĉio ĉi estis tre favoraj cirkonstancoj por la ripozo de 220 esperantistoj el 50 urboj.

Niaj esperantistaj tendaroj havas siajn apartajn trajtojn. Unue, nura parolata lingvo en ili estas Esperanto. Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne regas ĝin suface bone, plej bonaj pedagogoj gvidas interesajn konversaci-kursojn. Due, en niaj E-tendaroj ne estas pagataj laborantoj. Tio malaltigas la pagon por la partopreno kaj, aliflanke, permesas efektiviĝi la sloganon „For la mallaborulojn!“, t. e. ĉiu aktive partoprenas la preparon de interesaj iniciatoj.

Dum la komencantoj plibonigadis sian parolpovon, lernis E-kantojn kaj partoprenis facilajn konkursojn, la „spertuloj“ aŭskultis lekciojn pri historio de la E-movado, prelegojn pri popularsciencaj temoj, okupiĝis pri tradukado ktp.

Vespere okazis koncertoj, sportaj konkursoj, interesaj programoj, konkursoj, ĝajaj ludoj, horoj de poezio, nomfestoj, projekciado de amatoraj kinofilmoj kaj diapozitivaj. Du horojn daŭris la ĝaja festo de Neptuno. La tendaranoj ekskursis al la malnovaj urboj Ivanovo kaj Kineŝma. La granda grupo de Ufa efektivigis sociologian enketon.

Pro bona laboro dum la lernojaro la E-klubo de Ufa denove estis premiita per la transira vazo kaj ricevis valorajn donacojn. Inĝeniero Nina Cvilenova okupis la unuan lokon en la konkurso pri tradukado.

Laŭ informo de Boris Kolker,
membro de la Komitato de TEJO
(el j. „Veĉernjaja Ufa“, 31. VIII. 1974)

INAŬGURO DE TOMBOMONUMENTO DE JULIO BAGHY

La 14-an de julio en Budapeŝto okazis la inaŭguro de la tombomonumento de Julio Baghy en la Nacia Panteono de la poetoj kaj verkistoj en la Tombejo Mező Imre.

Ĉirkaŭ la tombo kolektiĝis grupo da esperantistoj — amikoj, disĉiploj, estimantoj de Paĉjo. Alvenis ankaŭ lia filo kun sia familio. Inter la partoprenantoj oni vidis gesamideanojn ankaŭ el la provincaj urboj. Partoprenis la solenajon ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.

Komence d-ro Jozefo Mátyásy — prezidanto de Hungara E-Asocio, festparolis, dirante inter alie:

„La 18-an de marto 1967 mortis en aĝo de 76 jaroj, post longa sufero, Julio Baghy.

Forflugis de tiam sep jaroj. Sed eĉ unu ne pasis sen tio, ke la amikoj, estimantoj, dankemaj disĉiploj ne estus vizitintaj lian ripozlokon okaze de la datrevenoj de lia morto. Jes, la morto estas nevenkebla, sed ne mortis tiu, kiun oni ame rememoras, kies rememoro, vivoverkoj kaj agoj eterni-



ĝas. Lia preskaŭ duonjarcenta agado merite konservas lian memoron.

Kiam J. Baghy, reveninte el milit-kapiteco en 1920, aliĝis al nia organizita movado, li ĵetis sin kun eksterordinara entuziasmo. Li rezignis pri sia aktora profesio kaj dum longaj jardekoj uzis ĉiujn siajn scionkaj kapablojn por akceli ekskluzive la aferon de Esperanto.

Veran surprizon kaj miron vekis lia poemkolekto „Preter la vivo“, prese aperinta en 1922 kiel lia unua volumo. En la sama jaro, redaktite de la du poetratoj (K. Kaloczay kaj J. Baghy), aperas „Literatura Mondo“ kaj ĉirkaŭ ĝi elformiĝis tiu skolo, kies efiko al saltsimila evoluo de la literatura lingvaĵo estas hodiaŭ jam internacie rekonata fakto.

Julio Baghy debutis kiel simbolo de la filantropaj esperoj de generacio naŭzinta militajn teruraĵojn kaj soifanta paco. Baghy jardekojn antaŭ la fondiĝo de la Packonsilantaro batalis per la armilo de la plumo kontraŭ ĉiaspeca primoko de la homa digno, kontraŭ sociaj maljustaĵoj kaj kontribuis al plifortiĝo de la publika opinio kon-

traŭmita.

Post lia morto kiel la unuan kaj ĝis nun la unikan inter la hungaraj esperantistoj inde trafis lin la honoro, ke la ĉefurba magistrato ornamis per memortabulo lian multjaran loĝdomon sur la strato „Rottenbiller“. Kaj nun la ĉefurba gvidantaro venigis la korpajn restaĵojn de nia mortinto el la ĝisnuna ripozloko tien ĉi, en la Nacian Panteonon, donacis al li honorlokon inter la eminentaj verkistoj kaj grave kontribuis eĉ al starigo de memorŝtono de artista kvalito.

Julio Baghy, la eterna vagabondo de la vojoj en sia vivo, alvenis nun jam al sia lasta, eterna, inda ripozloko. Heroldu tiu ĉi memorŝtono la sinceran estimon de la hungaraj esperantistoj kaj estu lia tomo pilgrima loko de ĉiuj esperantistoj en la mondo! “

Post la festparolo de d-ro Mátéffy okazis la inaŭguro de la bela, altnivela tombmonumento kun la epitafo: „Paĉjo, la homa homo.“ En la nomo de HEA la tombon florkronis Margit Evva kaj István Bodnár. Fine eksonis la Esperanto-himno „La Espero“.

Laŭ „Budaĉesta Informilo“, 9/1974

RIMARKINDA JUBILEO DE GDR

Kiam antaŭ 25 jaroj estis proklamita la Germana Demokratia Respubliko, la okcidentaj burĝaj gazetistoj kaj radio-komentantoj profetis disfalon de la nova ŝtato. Okazis tamen tiel, kiel diras la bulgara proverbo: La hundoj bojas, sed la karavano pluiras. . .

La Unueca Socialista Partio sub la saĝa gvido de sia Centra Komitato unuigis ĉirkaŭ sin la laboristan klason, la kamparanojn kaj la intelektularon kaj klare montris al ili la vojon al socialismo. Ekzemplon montris la lando de Lenin, la sovena popolo.

Post la milito pli ol la duono de la entreprenoj en Orienta Germanio, kie naskiĝis GDR, estis detruitaj. En 1946

la ekzistantaj fabrikoj produktis apenaŭ 40% kompare kun la antaŭmilita jaro 1936.

La fondo de GDR estas historia evento en la vivo de la germana popolo. Ĝi estas leĝkonforma fino de kelkdekjara batalo de la grandaj ideoj, por kiuj batalis la plej dignaj filoj de la germana popolo — la grandaj fondintoj de la scienca komunismo Karl Marks kaj Friedrich Engels, la bravaj revoluciuloj August Bebel kaj Vilhelm Liebknecht, Karl Liebknecht, Rosa Luxemburg, Ernst Thälmann.

Dum la Dua Mondmilito, komencita de la germana faŝismo, Germanio estis ege detruita. Tamen la antifaŝistoj, tra

vivantaj la hitleristan inferon, ne ektimis. Ilia avangardo — la Germana Unueca Socialista Partio, gvidis la restarigon: de la lando.

Ĉiuj sektoroj de la ŝtato, la tuta ekonomia, socia kaj kultura vivo bezonis urĝan restarigon. La rekonstruado estis malhelpata de la imperiistaj fortoj. Tiutempe la agresita politiko, la tiel nomata malvarma milito ege domagis al la juna GDR. Sed GDR kuraĝe repuŝis ĉiujn imperiistajn atakojn kaj daŭrigis sian vojon al la socialismo. Krome dum la ekonomia konstruado oni devis forigi sufiĉe grandajn diferencojn inter la indusribranĉoj. Oni bezonis grandan invest-kapitalon por havigi al la lando krudaĵojn.

Iom post iom kreskis ĝiaj ekonomiaj fortoj. Tion oni vidas, komparante la nacian enspezon de la respubliko. Ĉe ĝia proklamo en 1949 la nacia enspezo estis nur 22 miliardoj da markoj. Pasintjare ĝi jam atingis 126 miliardojn, do pli ol kvinoble.

Por la konstruado de energicentraloj, por la metalurgia industrio kaj maŝinkonstruado estis necesa streĉa kaj sinofera laboro, heroaj agoj. Tion donis la diligenta libera popolo de GDR. Centmiloj da civitanoj laboris libervole kaj sensalajre por forigi la dom- kaj fabrikuinojn, precipe la junularo kaj la membroj de la profesiaj unuiĝoj.

Pri la atingoj de GDR oni povas juĝi laŭ la fakto, ke nun ĝi okupas la dekan lokon en la vico de la alt-evoluintaj landoj en la mondo.

Tio estiĝis ebla, ĉar Sovetunio frate kaj konstante subtenis morale kaj materie la industriigon de GDR. La unua sekretario de la Germana Unueca Socialista Partio E. Honecker diris: „La historio de GDR estas antaŭ ĉio historio de ĉiam pli intima amikeco kaj kunlaboro kun la Partio de Lenin en la spirito de proleta internaciismo. Tion neniu el ni devas iam ajn forgesi.“

Dank' al la konstanta kamaradeca kunlaboro kun USSR kaj la ceteraj

socialismaj landoj estiĝis ebla la ekonomia progreso de la socialisma ŝtato GDR. Pri ĝiaj komercaj rilatoj kun ili parolas la fakto, ke du trionoj de ĝia eksporto apartenas al la socialismaj ŝtatoj.

La ekonomia impeto de GDR plialtigis la bonstaton de la popolo. La enspezoj de la laboristoj kaj kamparanoj dum la pasintaj 25 jaroj kreskis al 300%.

Jam en 1935, kiam en Germanio furiozis la faŝistaj barbaroj, la Komunisto Partio deklaris, ke ĝi strebas savi la germanan kulturon. La sovaĝuloj kun hitlerista signo bruligis verkojn de mondfamaj germanaj verkistoj, malpermesis progreseman kaj revolucian arton.

Tuj post la liberigo la Komunisto Partio faris ĉion eblan por revenigi el ekzilo la verkistojn kaj edukistojn por eduki novan intelektularon. Antaŭ 25 jaroj en GDR estis nur 45 000 studentoj, nun — 300 000. La duono de ili apartenas al la laboristaj kaj kamparanaj familioj. 90% de la studentoj ricevas stipendion. Tiamaniere en GDR oni likvidis por ĉiam la monopolon el la burĝa klaso kaj refutis la teorion, ke proletoj kaj kamparanoj ne posedas mensajn kapablojn por scienca kaj literatura agado.

En la Kulturbund (Kulturasocio) nun membras ĉiuj scienculoj, artistoj, kuracistoj, inĝenieroj kaj studentoj. En la kadro de tiu ĉi organizo agadas ankaŭ la esperantistoj de GDR.

Pri la grandiozaj sukcesoj de GDR ankaŭ ni, bulgaroj, povas iom fieri, ĉar en antaŭmilita Germanio tie vivis kaj laboris la granda filo de nia popolo — Georgi Dimitrov. En la obskuraj jaroj de la faŝismo li de la juĝbenko en naziista tribunalo defendis la Germanan Komunistan Partion, samkiel la komunistojn en la tuta mondo, senmaskigis la hitleranojn kiel murdistojn kaj militpreparantojn, kuraĝigis la laboristan klason al batalo kontraŭ la krimuloj, kaptintaj la regpotencon en Germanio.



Nun en GDR la nomo de G. Dimitrov estas honorata kune kun la nomoj de E. Thälmann, W. Pick kaj W. Ulbricht.

Inter la Germana Unueca Socialista Partio kaj la Bulgara Komunista Partio, inter la laboristaj klasoj de GDR kaj de Popola Respubliko Bulgario ekzistas tradicia amikeco. La neŝancelebla bazo de tiu amikeco, forĝita de Thälmann

kaj Dimitrov, estas la sama marksisma-leninisma mondkoncepto, la socialisma internaciismo.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, deziras al GDR, al ĝia popolo kaj al ĝiaj esperantistoj novajn sukcesojn en ilia nobla laboro!

Hr. Gorov

Vicprezidanto de BEA

LINGVAJ DEMANDOJ

PRI LA FORMO DE LA SLOGANO „AMIKECO TRANS LIMOJ“

Kion oni deziras esprimi per la slogano „Amikeco trans limoj“? Evidente, nur jenon: amikeco ligu homojn, kiuj troviĝas ambaŭflanke de ŝtataj aŭ landaj limoj. Oni tion esprimas per metafora uzo de la prepozicio „trans“, kiu signas movon sur pli malproksiman flankon de io apartiganta (aŭ sur pli malproksima flanko). Se oni dezirus esprimi la menciitan personon plene kaj gramatike ĝusta, oni devus diri: amikeco iru, etendiĝu aŭ disvastiĝu trans limojn. Do, la korekta formo estas „Amikeco trans limojn“. Ĉi tie nepre necesas akuzativo, ĉar temas pri morala movo, kiu respondas al la demando KIEN?, sed ne KIE?. Oni elipsas el la slogano la verbojn, ĉar ili facile divenblas.

La ĝisnuna formo de la slogano, fakte, signifas absurdon, se oni konsideras ĝian veran enhavon. Uzante nominativon de la vorto „limoj“ oni respondas al la demando „kie“, oni kvazaŭ parolas nur pri la amikeco, kiu ekzistas ne ĉi-flanke (cis limoj), sed nur translime. La nominativa formo de „limoj“ tute ne aludas pri tio, ke la amikaj sentoj „iru TRA limoj“, de unu flanko sur la alian.

La nominativa formo en la menciita slogano eblas nur se oni uzus la prepozicion „TRA“: „amikeco tra limoj“, aŭ pli bone: „amikecon tra limoj!“

Romano Grinŝpan
Taŝkento, Sovetunio

IUJ METODIKAJ DEMANDOJ DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

de Violin Oljanov

En la lastaj du jardekoj la Esperanto-movado en nia lando disvastiĝis sufiĉe. Multaj homoj trapasas la kursojn. Tamen sur la fono de tiu amaseco des pli bone reliefigas la malalta lingva nivelo de la bulgaraj esperantistoj. Estas konata fakto, ke la societoj ĉiam strebas al amasa malfermo de komencaj kursoj kaj subtakas la daŭrigajn. La malfermo de tiaj kursoj estas pres-

kaŭ esceptoj. Tiu fakto havas du konsekvencojn: granda parto de la finintaj la elementan kurson perdiĝas kaj ne revenas plu al la Movado, alia parto restas „eterne novaj esperantistoj“.

Grava kaŭzo pri tiu stato estas la manko de bonaj Esperanto-instruistoj, flamantaj en sia laboro, spertaj Esperanto-lingvistoj, kapablaj edukistoj kaj

metodikistoj. Eĉ en Sofio, kie estas akumuliĝinta la plej amasa esperantistaro, en kiu loĝas ankaŭ la plej elstaraj kaj plej spertaj esperantistoj, la Distrikta Esperanto-Komitato kaj la E-societoj renkontas malfacilaĵojn, kiam ili bezonas spertajn kursgvidantojn. Se en la ĉefurbo la krizo pri instruistoj estas sentebla, en la aliaj lokoj ofte oni ne povas malfermi kursojn nur pro tiu kaŭzo, aŭ oni faras kompromisojn komisiante la kursgvidadon al netaŭgaj personoj. Sed la regulo „Pli bone malbonaj ol neniaj“ ne ĉiam pravas, ofte la rezultoj estas negativaj, kompromisaj.

Jen pro kio unua inter la unuaj taskoj de la tulara Esperanto-movado devas esti la kreo de spertaj Esperanto-pedagogoj kaj propagandistoj. De longe pasis la tempo, kiam oni povis amatoze rilati al tiu plej grava aktiveco de nia Movado. Bona komenco estas metita per la Someraj Instruistaj Kursoj en Burgas. Sed tio estas nur komenco. La programo, laŭ kiu estas gvidataj tie la kursoj, jam malnoviĝas. En la procedo de ĝia apliko evidentiĝis mankoj. Erara, ekzemple, estas la praktiko, ke post duagrada kurso oni donas diplomon pri „supera kono de la lingvo“, kiu permesas al ĝiaj posedantoj eniri kurson por Esperanto-instruistoj kaj sin prezenti al ŝtata ekzameno pri instrurajto. La danĝero de tiu situacio estas klara. Ni sugestas antaŭtempe al la lernantoj, ke ili atingis la pinton, kaj ili ne plu havas stimulon al perfektigo. Ni puŝas al instruado homojn, kiuj havas nur bazajn sciojn kaj ankoraŭ mem ne estas tute certaj en ili. Sed la unua postulo al la instruisto estas bone regi la lingvon. Li devas havi aŭtoritaton antaŭ la lernantoj, sed li ĝin ne havos, se la lernantoj rimarkus (kaj ili nepre rimarkus!), ke li hezitas en siaj scioj. Sed la pli grava kaŭzo por tiu postulo estas, ke se la kono de la lingvo ne estus sufiĉa,

la instruisto ne povus bone prezenti la materialon al la lernantoj, ne povus koncentrigi sian atenton al la metodo, al la maniero de instruado.

La problemoj de la instruado, de ĝia organizo, de la preparo de Esperanto-instruistoj estas multaj. Sed ne ties analizo estas la tasko de ĉi tiuj miaj notoj. Evidente estas tempo apartigi pli grandan atenton al tiu unuaranga problemo de nia Movado. Ĝia solvo ne estas jam laŭ la fortoj de la apartaj societoj kaj eĉ de la distrikta komitatoj. Eble oni devas krei ĉe la Instruista Sekcio specialan institucion, kiu okupiĝos nur pri tiu gravega demando.

Nun, ĉe la ekzistanta stato, mia tasko estas dividi mian instruistan sperton kaj atentigi pri iuj praktikaj problemoj de la E-instruado por helpi al la novaj kolegoj kun ne granda sperto kaj tiumaniere kontribui al la plibonigo de la instrulaboro.

La metodo dependas de la celo

Metodo de la instruado estas la maniero, la procedaro, per kiu oni prezentas la materialon. Oni ne povas doni unu fojon por ĉiam la plej trafan metodon por atingi de maksimuma rezulto. La metodo dependas de multaj faktoroj, unua inter kiuj estas la stariĝita celo: ĉu la kurso estas ordinara praktika, ĉu por instruistoj, ĉu por tradukistoj, ĉu rapidega praktika kurso pro antaŭstaranta veturado eksterlanden ktp. Ne povas esti egalaj ankaŭ la metodoj de diversgradaj kursoj — komencaj, daŭrigaj, perfektigaj, seminarioj k. a. Tre grava estas ankaŭ la nivelo de la aŭditorio: instruiteco, kultura nivelo, lingva kulturo, aĝo, nombro de la partoprenantoj ktp. Eĉ la aŭditorio en rekta senco, t. e. la kursejo povas influi al la metodo: ĉu ĝi estas universitata aŭditorio, ĉu klasĉambro en elementa lernejo, ĉu halo en juĝejo aŭ en politika klubo.



Sed la metodo antaŭ ĉio dependas de la lektoro mem, de la sperto, kulturo, karaktero, klereco, lingva kulturo. Ne sufiĉe kompetenta lektoro, ne reganta bone la lingvon ne povus gvidi kurson ekzemple laŭ konversacia metodo, sen lernolibro, ĉar li bezonus ĉiam ian apogilon.

Oni ĉiam devas konsideri ankaŭ la okupatecon de la homoj. En la nuna tempo oni ordinare estas tre okupataj en profesia laboro kaj socia aktivado. Pro tio oni devas tiel instrui, ke la kursanoj lernu la novan materialon grandparte en la klaso; por la hejmo restu nur la neceso ripeti.

Kiel komenci?

La komenco estas unu el la plej gravaj momentoj de la kurso. La sukcesa komenco certigas almenaŭ je 50% la sukceson de la tuta kurso. Komprenoble, oni (ĉu la lektoro, ĉu iu el la organizantoj) devas fari enkondukan paroladon. Oni ne konsideru, ke ĉiuj lkursanoj estas anticipe konvinkitaj pri la utileco de Esperanto. Ĉe multaj ekzistas ankoraŭ dubo, hezito, ĉu vane¹ li ne perdos la tempon. La enkonduka parolado havas la celon daŭrigi la antaŭan propagandan kaj agitan laboron, ĝi devas definitive gajni la aŭskultantojn por nia afero, entuziasmigi, ardigi ilin. Tiu momento estas tre grava por la plua sukceso de la kurso.

Poste la lektoro klarigas la bazajn principojn de la metodo, kiun li sekvas. Tio estas neceso por fari la kursanojn siaj helpantoj, por ke la instruprocedo iru sen obstakloj. Post tiuj necesaj enkondukaj klarigoj la lektoro povas jam trankvile kaj laŭplane gvidi la kursanojn en la mirinda regno de la lingvo.

Estas tre grave, ke la kursanoj ne sentu la lecionojn, kaj precipe la unuan, kiel ion tute novan. Kontraŭe: ili vidu en la lecionoj ion konatan. En la komenco mem tion ni atingas per la internaciaj vortoj, kiuj en Esperanto

sonas tute same, aŭ preskaŭ same kiel ankaŭ en la bulgara. Tiaj vortoj estas ekzemple: studento, generalo, poeto, vino, kapitano, artisto, telefono, aparato, aeroplano, dokumento, motoro, sezono, romano, portreto ktp. ktp.

La unua parto de tiuj vortoj ne devas havi ian ajn komplikajon aŭ dubon. Post la unua paŝo ni povas fari la duan: prezenti samspecajn internaciajn vortojn kun akcento diferenca de la bulgara kaj fine — kun specifaj literoj (supersignitaj aŭ kun prononco diferenca de la prononco en la eŭropaj ĉeflingvoj). Tiaj vortoj estas ekzemple: geografio, nacio, profesoro, muziko, matematiko, logiko, poŝto, ĉokolado ktp. Tiumaniere la aŭskultantoj klare eksentas la regulon pri la akcento kaj la specifajn Esperanto-literojn, kiujn la lektoro devas emfazi. Do, la formuligo de la regulo estiĝas superflua, kiel ankaŭ en la plimulto de okazoj — la instruo de la alfabeto.

Per tio ni atingas kelkajn celojn. Ni kompletigas la efikon de la enkonduka parolado, montrante la facilecon de Esperanto. La kursanoj tuj ekkomprenas la novan lingvon. Ili facile legas la novajn vortojn kaj tiamaniere ekkonas la Esperantan literaron. Ili ekkutimas al regula akcentado kaj prononcadado. Jam en la komenco mem ni malkovras la gravan regulon de la Zamenhofa gramatiko, ke ĉiuj internaciaj vortoj eniras en Esperanton.

Tiuj internaciaj kaj konataj al la kursanoj vortoj prezentas sufiĉan fonduson por alpaŝo al la unuaj frazoj:

Smirnenski estas poeto. Zaimov estas generalo. Telefono estas aparato. Pasporto estas dokumento.

Tie ĉi ni agas laŭ la formulo:

$$a + x = b$$

En la frazo *a* estas *Smirnenski* (konata al la kursanoj); *b* estas *poeto* (konata); *x* — ne konata (la verbo *estas*), kiun oni facile povas trovi laŭ senco.

Tiun ĉi formulon ni devas utiligi en

(Sekvas sur p. 29)



DOKTORO KAJ LINGVO ESPERANTO

*De Adolf Holzhaus Eldonis Fondumo Esperanto, Helsinki, 1970, p. 524,
20,3×14,6 cm, forte bindita, ofsete presita.*

En la lastaj jaroj la malnova usona esperantisto A. Holzhaus, bone konata al la bulgara esperantistaro pro siaj kontribuoj aperintaj en „Bulgara Esperantisto“ (1963, 1966) kaj „Nunttempa Bulgario“ (1963), pretigis kaj eldonis kelkajn librojn. La nun recenzata libro estas konsiderata kiel lia ĉefverko. Ĝin li verkis dum kelkaj jaroj kaj studoj abunde ilustritaj ĉu per nekonataj aŭ malfacile troveblaj tekstoj, ĉu per anoncoj kaj verb-artikoloj el la fruaj jaroj de la E-movado, ĉu per propagandaj gazet- kaj broŝuret-kontribuoj de L. Zamenhof. Kiam temas pri nacilingvaj tekstoj, ili estas aŭ fotokopitaj aŭ fidele reprezentitaj kaj ĉiam akompanitaj de paralela traduko en Esperanto. Multloke la aŭtoro intence kaj insiste klopodis kaj sukcesis elfosi tre valorajn materialojn pri la biografio de d-ro Esperanto, pri la historio de nia Movado, lingvo kaj ties literaturo. Kiel tuto la verko estas tre valoro.

Pro la limigita spaco en la paĝoj de nia gazeto ne estas eble prezenti ĉiujn niajn rimarkojn, sed ni mencias nur kelkajn:

1. La unua bulgara esperantisto Miloslav St. Bogdanov (d-ro Diodono) esperantistiĝis ne en 1889, sed pli frue, nome en 1887. En 1889 li jam korespondis kun L. Zamenhof kaj kun la rusa esperantisto Majnov. Krom tio en la sama jaro M. S. Bogdanov kunlaboris al la Nurenberga „La Esperantisto“ kaj komencis eldoni la unuan en la mondo landan Esperanto-presorganon „La Mondlingvisto“.

La unua libro (por rusoj) aperis en julio 1887 kaj estis elĉerpita tuj. Ĝuste pro tio L. Zamenhof klopodis akiri permeson por reeldoni ĝin kaj sukcesis havigi la permeson en la lasta tago de la sama jaro (la 31-an de decembro 1887). La juna Miloslav St. Bogdanov tiam eldonis kaj redaktis ĵurnalon „Balgarski Novini“ (Bulgaraj Novajoj) en Sofio, interesiĝis pri la sociaj, politikaj kaj filologiaj problemoj. Do, li havis eblecon detale observi la internaciajn novaĵojn kaj ekscii pri la apero de Esperanto. En nia lando oni abonis la ruslingvan „Ruski Vestnik“ (Rusa Gazeto). En ĉi ĝia numero aperis informo pri publikigo de nova Internacia Lingvo de d-ro Esperanto. Ekzempleroj de tiu gazeto troviĝas ankaŭ nun en Bulgario. Tio montras, ke interesiĝemuloj havis tute realan eblecon esti bone

kaj siatempe informitaj.

Dum la kompilado de sia bulgara E-lernolibro M. S. Bogdanov uzis ekzempleron de la Unua Libro (por rusoj) eldonita en julio 1887. Ekzistas pri tio kelkaj argumentoj, mi mencias ĉi tie nur unu. La unua eldono de la Unua Libro enhavis en sia vortaro la arkaisman radikon „sper“ („esper“). Tiu sama radiko reaperas nur en la menciita jam Bogdanov-lernolibro por bulgaroj (1890). M. S. Bogdanov povis ĉerpi tiun radikon nur el la unua eldono de la Unua Libro (por rusoj). Konklude: Bogdanov lernis Esperanton jam en 1887.

2. Neĝuste estas prezentita ankaŭ la esperantistigo de du aliaj pioniroj de la bulgara E-movado: Ĥristo Popov (1870 — 1945) kaj Georgi P. Oreŝkov (1863—1949). Laŭ A. Holzhaus ili esperantistiĝis en 1891. Ili tamen esperantistiĝis pli frue. Iliaj nomoj estas presitaj en la listo de abonantoj al la unua jarkolekto de „La Esperantisto“ (1889—1890). En volumo I-a de sia verko „Historio de la lingvo Esperanto (1887—1900)“, Ĝenevo, 1912, Edmond Privat kun simpatio mencias, ke inter la 113 pagintaj abonantoj troviĝas la nomoj de tri bulgaroj (Bogdanov, Oreŝkov kaj Popov). Do, minimume oni devas konkludi, ke Oreŝkov kaj Popov aliĝis al Esperanto en 1887.

3. A. Holzhaus konfirmas ankaŭ ĉi tie (p. 71) sian tezon, ke fotorepresita eldono de la Unua Libro (en Helsinki, 1948) fare de Vilho Setälä estas reproduktita el la dua eldono de la sama verko. Li apogas sin per argumentoj el gazetoj „Esperanto“, n-ro 587, de okt. 1954, p. 278, el „Nordamerika Esperanto-Revuo“ de januaro-februaro 1957, p. 5, kaj el privata letero de la 3-a de junio 1960 de Charles Chomette al A. Holzhaus. Hodiaŭ denove mi komparas la fotorepresitan eldonon de la Unua Libro (de V. Setälä) kun aŭtenta ekzemplero de la dua eldono de la Unua Libro. Ili ne estas identaj. Tio renversas la tezon de A. Holzhaus. En la dua origina eldono de la Unua Libro la teksto estas mallongigita. Redukto estas efektivigita per allaso de du frazoj (dek kaj duono da linioj) en p. 27 kaj de du frazoj (sep linioj) en p. 28. Rezulte de tio p. 30 havas nur 10 liniojn. Krome en la foli-vortareto mankas la arkaisma radiko „sper“ (esper), kiun enhavas la unua eldono de la Unua Libro. La eldono de V. Setälä ankaŭ enhavas la radikon „sper“. Mi opinias, ke V. Setälä reproduktis fotopresite ne la duan, sed la unuan eldonon de la Unua Libro.



4. Mankas mencio kaj inter la verkoj de L. Zamenhof en rusa lingvo (p. 70—72), kaj inter la E-libroj aperintaj en Ruslando (p. 491—513), kaj inter la datoj de la cenzuraj permesoj (p. 518—519) pri la ruslingva lernolibro, kies titolpaĝo en traduko tekstas: „Es-

peranto Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro. Nova stereotipa eldono. St-Peterburgo. 1894“. Ĝia cenzura permeso estas de la 1 de aprilo 1894.

Canko Murgin

NUDA INTER LUPOJ

de BRUNO APITZ. Edition Leipzig, Verlag für Kunst und Wissenschaft, GDR, 701 Leipzig, 500 tekstopaĝoj, 12×19 cm, tuttote bindita. Eldono en Esperanto. Prezo 12 GDR markoj.

La unua germana romano pri la koncentrejo Buchenwald aperis somere de la jaro 1958 kaj baldaŭ farigis literatura mondsukceso.

Sole la germana eldono atingis kvanton de 865 000 ekzempleroj, kaj la tutmonda eldonkvanto (la romano tradukita en 27 lingvojn) estas ĉ. 2 milionoj.

La historio pri la savo de la malgranda pola infano Stefan ne estas konata nur el la romano. Multaj ĝin mem reale travivis! Centmiloj estis profunde emociitaj de la teatraĵo, radiospektaklo, televida scenejo kaj filmo. Kaj ĉiuj ĝojegis, kiam post preskaŭ 20 jaroj tiu ĉi infano — Stefan-Jerzy Zweig — estis re-trovita, maturiĝinta al sana kaj juna viro, optimisma pri la estonto. Ĉiu, konatigante kun la verko, certe komprenos la aŭtoron, se li diras, ke tiu libro volas rakonti multe pli ol nur la historion pri la savo de infano: ĝi konigas la triumfon de la homa solidareco.

... Pippig, kondukanta nerveze kaj ekscitite, kun longe etendita kolo ankoraŭ foje flaris suspekto ĉirkaŭ la staploj, frotis siajn manojn kaj rikanis al Kropinski, dirante: „Nun atentu, kion mi kunportis...“ Tiam li klake malfermis la serurojn kaj levis la kovrilon de la kofro. Larĝkrure li enpogis la manojn kaj ĝuis la sukceson de sia surprizo: en la kofro kuŝis infano, kurbiginta en si, premanta la manetojn antaŭ la vizaĝo, volvita en ĉifonoj, knabeto, havanta ne pli ol tri jarojn.

Kropinski kaŭriĝis kaj fikse rigardis la infanon. Tiu kuŝis senmove. Pippig karese glitis manon super la malgranda korpo.

„Kateĉjo. Alkuris al ni.“

Li volis turni la infanon ĉe la ŝultro, sed tiu ŝajnis kontraŭstari. Fine Kropinski trovis vorton: „Mizera vermo — li diris pole, — de kie vi venis?“ Aŭdante la polajn sonojn, la infano antaŭenŝovis sian kapeton, kvazaŭ insekto eltrinta la palpilojn. Malforta, unua manifestiĝo

de vivo, tiel ege ekscita por la du, ke ili fascinite rigardis en la okulojn de la infano. La mallarĝa vizaĝo jam havis la seriozecon de scianta homo, kaj sur la okuloj kuŝis brilo tute ne plu infana. La infano rigardis la virojn kun muta atendo. Ili apenaŭ kuraĝis spiri.

Io nekredebla okazas: en kofro oni trovas malgrandan senhelpan infanon! Ĉin alportis polo, kiu ĝin savis ĝis tie ĉi — ĝis la fifama koncentrejo.

Infano en la koncentrejo: tio signifas novajn danĝerojn por la rezista grupo, kiu ĝis nun sukcesis kaŝe labori, preparante la tagon de la liberigo. Estas mallonge antaŭ la militfino, nenies vivo estu endanĝerigita, sed neniu estas tiel nuda, tiel sengarda antaŭ la murdistoj kiel la infano.

Sur la fono de la koncentrejo Buchenwald la aŭtoro skizas kortuŝan bildon pri tiuj dramplenaj monatoj, kiuj kondukis al la ribelo kaj la liberigo.

la tuta kurso, ĉar ĝi ebligas la eviton de tradukado, kio estas tre grava por la bona adopto de la instruita materialo, por alta sukceso. Pri tio ni parolos poste.

Iom post iom ni transiras al la demandoj kun *ĉu*, *kio*, *kiu*, *kia* ktp.

Do, ni konstatas, ke la maŝino jam

funkcias sen bremsoj, la kursanoj nin komprenas eĉ sen uzo de la gepatra lingvo. Ili ankaŭ ĝojas, ke jam en la unua leciono ili ĉion komprenas sen traduko, kio krom pedagogia signifo havas ankaŭ bonan psikologian efikon.

(Daŭrigota)



Ljuba Bojaĝieva

NIA SEPTEMBRO

Septembro, septembro,
monato plej riĉa,
belega vi estas.
Kaj ĉiam vi festas
donante abunde
la fruktojn de l'tero,
kiujn ni ĉiuj
atendas de vi!

Septembro, septembro,
monato feliĉa,
plej bela vi estas.
En vi ĉiuj festas
prenitan per lukto
liberon de l'tero,
kie naskiĝis
kaj panjo, kaj mi!

PROVERBOJ

El popola cerbo venas la proverbo.
La gast' agrabla estas, se li mallonge
restas.

Akvo kaj pano servas al sano.
Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto.
Amiko fidela — trezoro plej bela.
La amo kunigas, malamo disigas.

D. P. Antonov

JUBILEA EKSPOZICIO

El letero al bulgara esperantisto

Altestimata k-do Konkovski

Nepriskribebla estis nia ĝojo, kiam ni ricevis vian poŝtkarton el la 59-a UK de Esperanto en Hamburgo, kun la speciala kongresstampo kaj aŭfrankita per poŝtmarko pri

Ljudmila Jevsejeva

MATENE

Je la sepa kaj duono
gaje kantas te-kaldrono
sur gas-forno kuireja.

Antaŭ marŝo al lernejo
bonas, Hugo, glas' da teo,
peco dolĉa da bakaĵo,
abrikota konfitaĵo.

RANO

Kiel verda baloneto
saltas rano al lago:to:
— Kva-kva-kva-kvo!
Kva-kva-kva-kvo!
Bonas vivo en la akvo.

la fama pentristo Hans Holbein (mi okupiĝas pri pentrado, tial ĉi temo estas al mi tre proksima). Tio, ke en Hamburgo vi trovis tempon rememori nin kaj eĉ skribi al ni, estas vere kortuŝa!

Nia lerneja kolektivo festis la 30-an jubileon de via Revolucio. Ni eksponis E-literaturon, mi rakontis pri via traduklaboro super „Sub la jugo“, pri miaj rememoroj el nia renkontiĝo en Viljandi, demonstris viajn hamburgajn poŝtkartojn kaj aliajn viajn sendaĵojn.

Niaj verkistoj petas min traduki iliajn verkojn en Esperanton, tial mi nun komencas ĉi-laboron.

Bonvolu akcepti la aldonitan gratulleteron de nia kolektivo!

Estimplene via

Arturs Kubulnieks

E-Rondeto „Fajrero“, distrikto Aluksne,
lernejo Ziemeri, 228732 Marinkaulus, Latvija
SSR, Sovetunio

Ĉu per via agado dum la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ vi okupas lokon sur ĝia nobla VERDA TABULO?



Distroj

MIAM TIO OKAZIS
de Zurhan Ĝemazaŝvili

Ŝi havis grandajn grizajn okulojn kaj aĝon de 28 jaroj.

Li havis longajn gambojn kaj modernan pantalonon. Ankaŭ li estis 28-jara.

La 47-jara juĝisto, kiu dum sia vivo vidis multnombrajn eksedziĝojn, tute ne volis, ke tiu ĉi jura familio disfalu.

— Kiam vi geedzigis? — li demandis.

— Demandu lin, li verŝajne eĉ ne memoras...

En ŝiaj okuloj vidiĝis larmoj.

— Jen! Komenciĝas! — ekspiris la edzo.

— Kiel mi povas forgesi? En la sama tago ni venkis la teamon de „Spartak“¹ per 2:0. Tio okazis la tridek unuan de marto sesdekkvara.

La juĝisto atente rigardis la edzon kaj poste denove sin turnis al la edzino:

— Ĉu vi havas infanojn?

— Jes, knabon... — Ŝia vizaĝo por momento heliĝis. — Sed demandu lin. Ĉu li memoras, ke li havas filon aŭ ne?

— Vi denove pri la samo, — la edzo kuntiris la brovojn. — Kiel mi povus ne memori tiun daton? Ĉu la filo ne naskiĝis en novembro sesdek sepa? En la sama tago ni ludis kaj grandioze venkis la moskvan „Dinamon“ per 5:2. Ĉi estis vera matĉo! Ĉu vi memoras?

La okuloj de la juĝisto por momento ekbrilis, sed li tuj serioziĝis.

— Kiam vi komencis kvereli?

— En sesdek kvina. Terura estis la jaro. Ni malvenkis kontraŭ „Zenit“ per

2:1 la dekkvaran de julio, kvankam ni havis ankoraŭ ŝancon por la unua loko. Kaj subite la moskva „Dinamo“ nin venkis per 2:1, ambaŭfoje golis Ĉislenko. Sed poste ni ludis kun „Ŝah-tjor“ egalan matĉon...

— Ĉu vi aŭdas? — ŝi demandis signifoplene.

— Mi vin komprenas, — komplete ekspiris la juĝisto.

— Mi malbenas la tagon kaj la lokon, — ŝi ekĝemis. — Same en la stadiono ni renkontiĝis...

— Jes, jes, en la stadiono. Ho, diablo, jen tio estis ludo! „Dinamo“ (Moskvo) — „Dinamo“ (Tbilisi). Per 2:1 venkis tbilisanoj. La aŭtoroj de la goloj estis Metreveli kaj Meŝhi. Ili golis vere profesie. Miŝa Meŝhi batas per la maldekstra piedo, Beljaev saltas...

Kaj jen la juĝisto ne eltenis kaj frapis la tablon per pugno:

— Unue, Mesni golis tiufoje per la kapo! Due, la golulo estis ne Beljaev, sed Lev Jaŝin! Kaj, trie, mi ne eksedzigos vin. Mi ne permesos, ke la familio disfalu pro piedpilko. Trankviliĝu, — li sin turnis al la juna virino. — Mi verdiktos, ke al via edzo oni dum la tuta 1974 jaro ne permesu viziti la stadionon dum futbalmaĉoj.

El la rusa: Dimitrij Cibulevskij

Solvo de la vortplektajo en n-ro 6:

1. Kajero. 2. Sporto. 3. Roboto. 4. Veturi.
5. Oceano. 6. Morgaŭ. 7. Letero. 8. Krajono.
9. Doktoro. 10. Dimanĉo. 11. Aŭgusto. 12. Mag-
neto. 13. Futbalo.

¹ Tie ĉi kaj plue estas nomataj piedpilkaĵteamoj de Sovetunio kaj iliaj membroj.

Lafontaine havis kutimon manĝi ĉi-matene po unu bakita pomo. Foje li lasis ĵus bakitan frukton ĉe la kame-non, por ke ĝi malvarmiĝu, kaj iris en sian bibliotekon serĉi iun libron. Amiko eniris la ĉambron, rimarkis la pomon kaj formanĝis ĝin. Reveninte Lafontaine ne trovis la pomon. Sed li divenis tion, kio okazis. Tiam li ekkriis:

— Ho, dio mia! Kiu formanĝis la pomon, kiun mi lasis ĉe la kamenton?

— Tiu ne estas mi, — respondis la

gasto.

— Des pli bone, mia amiko.

— Kial?

— Ĉar, — komencis Lafontaine, — mi metis arsenikon tien por veneni ratojn.

— Arsenikon! — ekkriis la amiko. — Tiam mi estas venenita!


— Trankviliĝu, tio estas ŝerco, kiun mi faris por ekscii, kiu formanĝis mian pomon, — diris Lafontaine.

El la franca: Janka Daskalova

Ĉevaliro

Sekvu akurate la saltadon de ĉevalo seninterrompe de la unua ĝis la kvara kvadrato kaj vi ricevos ĉiam aktualan alvokon de la Redakcio.

M. Bâcev



deziras korespondi

Bulgario

Georgi Getov — bulv. Ĥr. Botev 48, redakcio „Grajdanska Otrbana“ *Sofio* C (33-jara — ĵurnalisto — kun bulgaraj kaj eksterlandaj gejunuloj pri ĉt).

Nadejda S. Bliznakova — str. Knjaz Emeritinski 103, *Loveĉ* (19-jara — kun junuloj el ĉt, pri ĉt).

Tihomir Kirov — zavod „Balkan“, ceĥ „Termičen“, *Loveĉ* (kun ĉt pri ĉt).

Milka Ivanova — str. Ĉar Osvoboditel 23, *Loveĉ* (24-jara — kun ĉt).

Dimitr Dobrev — selo Brjast, *Plevensko* (kun ĉt pri ĉt).

Nevena Ganĉeva — *Sofio*, Dragalevci (kun ĉt pri ĉt).

Krajĉo Markov Krajĉev — selo Lazar Stano-vo, *Loveŝko* (55-jara — kun ĉt pri ĉt).

Brazilo

Jorge Alves Pereira — Av. Augusto Severo 156/406, Gloria—ZC — 06 20 000 Rio de Janeiro GB (18-jara studento de turismo — kun ĉt pri turismo, folkloro, historio, geografio).

GDR

Eva Wolf — DDR — 99 Plauen, Hartmanstr. 12, (16-jara lernantino — kun ĉt pri ĉt, precipe pri naturscienco kaj moderna muziko).

Günter Walz — 1952 *Altruppin*, Kirchplatz 2-a, GDR (36-jara — kun ĉt pri ĉt).

Pollando

Margaret Sugieva — *Czuchow*, 08—210 Platerow (16-jara lernantino — pri Esperanto, interesaj libroj, literaturo — kun bulgaraj gejunuloj).

Jadwiga Hobeniewska — 59—220 *Legnica*, ul. Parkowa 5a/6, voj. Wrocław (kun ĉi pri literaturo, muziko, arkitekturo, turismo, k. a. pm, bk, diapozitivoj — en Esperanto, rusa, germana).

Izabela Sawoyka — *Łódź*, 93—248, ul. Mąskuszynskiego 3 m 41 (27-jara — muziko, literaturo, sporto, bk).

Waldemar Wroblewski — 54—139 *Wrocław*, ul. Hufnicza 45-a (17-jara lernanto — kun ĉi pri junularaj problemoj, politiko, arkitekturo, bk, prospektaj, esperantaj k. a.).

Zbigniew Molak — ul. Pruszkowska 12 m 45, 02—119 *Varsovio* (16-jara — kun bulgaraj gejunuloj pri muziko, arkitekturo, sporto, filatelo).



Kristina Knasiecka — 61883 Poznań 3, ul. Rybaki, 8 m. 75 (sur la foto; pri muziko, dancoj, turismo, lingvoj).

Rumanio

Mihail Petre Dunceanu — PO Box 502, *Suceava* 6(42-jara abelbredisto — kun ĉi pri abelbredado).

Faida Ec. Lavinia — str. Lăzlar 5, Sect 8, *București* 2 (37-j. oficistino — kun ĉi pri ĉi).

Sovetunio

Friderik Batrik — 245 110 *Ŝostka*, Privokzalna 1ĉ—10, Ukrainio (27-jara — muziko, bk).

Valerij Gromov — 245 110 *Ŝostka*, Privokzalna 11—12, Ukrainio (25-jara—teatro, bk).

Snŝko Aleksandro — tajkos pr. 10—49, 235 800 *Klajpeda*, Litovio (17-jara — kun ĉi pri ĉi).

Vilemaŝtite Auŝra — 234 288, Vilkaviŝkio raj, *Alvitas*, Litovio (22-jara instruistino — kun gejunuloj el ĉi).

Vladimir Sapojnikov — 660 075 *Krasnojarsk* 75, p. k. 2420 (kun ĉi pri biologio, lingvoj, E-literaturo, E-movado k. a.).

Anatolio Dovbiŝ — 245 110 *Ŝostka*, Sumŝkaja obl., do vestrebov: n a, Ukrainio, (31-jara — pri E-movado, glumarkoj, insignoj, esperantajoj).

Irina Betehtina — *Omsk* 7, str. Gercena 40, kv. 19 (20-j. studentino kun ĉi pri lingvoj, sporto, muziko, pm, k. a.).

Sergej Vorobjov — 141 650 *Visokovsk*, Moskovskaja oblast, str. Pervomajskaja 7/15—205 (16-j. — kun ĉi pri ĉi).

Ljudmila Ananina — str. Parkovaja d. 10, kv. 100, 308 005 *Lipeck* (19-j. studentino en politekniko — kun ĉi pri ĉi).

Laima Kazlauskaitė — *Paneveŝis*, Lakŝtingalu 12, Litovio (16-j. — kun ĉi pri ĉi).

Sumanov Viktor F. — 660 062, *Krasnojarsk* 62. abon. jaŝĉik 23 (kun ĉi; interŝanĝas insignojn medalojn).

Vida Lakodskite — Joniŝkelis, str. Taribu 13. reg. Pasvalis, Litovio (18-jara — bk, pm, insignoj, gram diskoj).

Birute Ryvityte — str. Lenin a. 12—62, *Vilnius* 232 000, Litovio (16-jara lernantino — kun ĉi).

Boris Samojlenko — *Tallinn*— 200 001, Poste restante, Estonio (21-jara maristo — kun ĉi pri ĉi).

Ahti Mand — 200 016 *Tallinn*, Kaare 18-B *Estonio* (16-jara lernanto — pri muziko, gram diskoj, arto, filmoj, pmj).

Ullar Luga — 200 016 *Tallinn*, Suurtiiki 25-1, Estonio (15-jara lernanto — pri fotografio, pm).

Tiit Padam — 200 016 *Tallinn*, Tähhe 36-A, Estonio (16-jara. tutmonde pri filmoj, arto, muziko, pm).

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Steŝka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâŝtju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Teknika aranĝanto: Prodan PRODANOV

Korektis: Minko Conkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Tiit Viisnap — *Viljandi*. Pioneeri 23-3 (flegistino — pri ĉti).

Marfemjanov Konstantin V. — 460 000 *Orenburg*, ul. 8-ogo Marta, 30 kv. 9 (kun ĉl pri ĉti).

Aksel Kivistik — 200034 *Tallinn*. Ed. Vilde tee 50-23, Estonio (volonte renkontiĝos kun turistoj, kiuj vizitos Tallin).

Lefkifimana Tamara — 310000 *Harkov*. Primerovskaja 8 kv. 6, Ukrainio (19-jara studentino — kun ĉl pri ĉti, bk, pm).

Laimundas Abromas — *Jurbarkas*, p. Šiline 234432, Litovio (18-jara studento — pri E-movado, lit-ro, bk k. a.).

Esperanto-rondeto en fizik-matematika lernejo dez. korespondi kun ĉl pri ĉti (aĝo 14—16-jaraj) Komuna adreso: 630 090 *Novosibirsk* 90, str. Pirogova 11, FML—165, Esperanto-rondeto, USSR.

Esperanto-rondeto de lernantoj kaj ilia E-instruisto dez. korespondi kun ĉl pri ĉti, interŝanĝas pm, bk. Komuna adreso: Avo Suurmets *Värskä* — 202615, Polva raj, Estonio USSR.

Ly Palu — *Viljandi*, Leola 38—4, Estonio (kudristino — kun ĉl).

Heimi Rahumets — *Viljandi* Kivi 5 — 2, Estonio, (kuracistino — kun ĉl).

Lena Šestakova — ul. V. Gjugu 18-a *Harkov* 32, Ukrainio 410 032

Jaanus Kallula — *Viljandi*, posti 14 — 7 (lernanto 8 klasi).

Ebe Meiesaar — *Viljandi*, str. Lääne 16 (laboristino).

Viivi Oepa — *Viljandi*, str. Pohja 2 b — 6 (oficistino).

Ruben Rahumets — *Viljandi*, Kivi 5 — 2 (kuracisto).

Mis Kurki — str. Pertovaia 174, kv. 7, 344 054 *Kiev* 19, Ukrainio (19-jara lernanto — bk, pm, revuoj, libroj, pri ĉt kun samaguloj el ĉl).

Luda Grinkina — *Novij Gorodok*, dom 18 kv. 6. 346 420 *Novočerkask*, Ukrainio (14-jara lernantino — bk, pm, fotoj de aktoroj, insignoj, alumetetiketoj, libroj — pri ĉti).

Sveta Paŝenko — *Novij Gorodok*, 18, kv. 1, 346 420 *Novočerkask*, Ukrainio (13-jara lernantino — bk, pm, infanlibroj, insignoj, esperantaj, alumetetiketoj — kun samaguloj — el ĉl).

R. Bivaini — Saldutiŝko post, *Sudutankio* km. Utenos raj. Litovio (17-jara lernanto — kun ĉl pri muziko, pm, bk).

Rimantas Lisauskas — d-ro Ignalina, p-to Hinkmenis, Litovio (21-jara studento — kun seriozaj kolektantoj de gram. diskoj, medaloj, ekslibrisoj, insignoj k. s. pri ĉti pri ĉl).

Edgard Ĥumiĉ — ab. jaŝ. 1, 350 000 *Krasnodar* (pri lit-ro, historio esperantaj, ekslibrisoj, bk — kun ĉl).

P. Zardyti — 234 900 Saldutiŝkis, Vidurine mokikla XVIII kl, Utenos rajonas, Litovio (15-jara lernantino — kun ĉl pri sporto, muziko, teatro k. a.).

Helena Loit *Aidu*, s. jsk. Muri Punkool Estonio (laboristino — kun ĉl pri ĉti).

Laila ŭĉkauskaitė Ruma — 234 900 Saldutiŝkis, Vidurine mokykla, Utenos rajonas, Litovio, (15-jara lernantino — kun ĉl pri muziko, sporto, teatro k. a.).

D. Juodyte — 234 900 Saldutiŝkis, Vidurine, mokykla IX kl. Litovio (16-jara lernantino — kun ĉl pri sporto, muziko k. a.).

Svedio

Jan Vedevik — poŝt. restante, 4010 *Göteborg* 1 (55 jara) (fiesto — kun bulgarinoj pri ĉti, prefere literaturo, arto, naturo, bk).

LITERATURA INTERNACIA KONKURSO (TEATRO)

Centro de Esperanto Sabadell organizas internacian konkurson, en kiu estos premitaj la verkoj plej gajaj, modernaj, sprucantaj felĉon kaj amon al la vivo, kun grandnombra rolantaro, cele al teatro-prezentado.

Oni aljuĝos du premiojn, ambaŭ kun rajto al unumonata senpaga restado inter Sabadell kaj „Costa Brava“.

Oni ne bezonas kaŝi sian nomon en aparta koverto. Limdato: la 15-a de marto 1975.

Pliajn informojn petu de: Centro de Esperanto Sabadell, Apartado 407. SABADELL (Barcelona), Hispanio.

En Tolbuhin forpasis la plej maljuna esperantisto

MIĤAIL BATANOV

La forpasinto estas fondinto de la unua E-societo en la urbo kaj ĝia unua prezidanto. Niajn kondolencojn!
